

1977 septembro

70-a jaro


n-ro 861 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



**Reelekto
de Tonkin**



**62a UK:
Normoj kaj defioj
de Rejkjaviko**

Vi trovos

klopodon sur dudek paĝoj bildigi la tutan riĉon de unu el la plej sukcesaj Universalaj Kongresoj en la historio de la Esperanto-movado. Vana klopodo. La bildo palas kiel ajn ni enfokusigu niajn lensojn, ĉar restas maleble prinoti eĉ nur ĉiujn gravajn trajtojn de septaga kongresa vivo, kiu per sia intenseco provas travivi ankaŭ la reston de 358 tagoj de la jaro. Palas nia bildigo ankaŭ pro tio, ke la Kongreso en Rejkjaviko multilate estis nova kaj freŝspira, ke ĝia prestiĝo bole elversigis trans la randojn de la tradicia movada kaldrono. Feliĉe tamen, ke tio okazis. Feliĉe, eĉ se nia bildo pro tio palas, ĉar imago pri la Internacia Lingvo enfokusigas ĉe aliaj — ekstermovadaj — bildigantoj. Kiam oni superkreskas sian mallongan pantalonon, tio estas tempo por ĝoji.

Enhavo

- 141 62a Universala Kongreso de Esperanto: Perlo en la kongresa koliero
- 142 Solena Inaŭguro de la 62a Universala Kongreso: Inaŭguro, la plej solena
- 143 Vilhjálmur Hallgrímsson, kulturministro de Islando: Oraj promesoj de la esperantistoj
- 144 Parolado de la Ĝenerala Direktoro de Unesko: Vin motivas respekto al kultura diverseco kaj deziro de interproksimiĝo (Amadou-Mahtar M'Bow)
- 146 Rezolucio de la 62a Universala Kongreso
- 148 Parolado de la prezidanto de UEA en la Solena Malfermo de la 62a UK: Esperanto trovis sian strategion (Humphrey R. Tonkin)
- 150 Honoraj Patrona Komitato kaj Membraro: UEA honoras tri eminentulojn
- 151 Internacia Somera Universitato: Modela lekciaro, Ĉu vi fotis en UK?
- 152 Ĝeneralaj kunsidoj: Funda pritrakto de la ĉeftemo, La rajto je komunikado (Konkludoj de la studrondoj pri la kongresa ĉeftemo)
- 153 Teatraj programoj: Ĉiuj laŭroj iras al "Inuk"
- 154 Belartaj Konkursoj de UEA 1977: Rezultoj, Originala poezio (Unua premio): La blankaj perloj (Vesna Skaljer-Race), Kelklinie pri . . .
- 155 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: Sub la signo de elektoj, Du CED-kunvenoj en Rejkjaviko: Ambiciaj planoj (U. Lins)
- 156 Internacia Arta Vespero: Elstara Damjanov
- 157 Islanda Vespero: Bukedo manka, Songpoemo pri ponto (Ólafur J. Sigurdsson), Orgenkonzerto (M. Angelova)
- 158 Sagaa festo, Ferma solenaĵo, Post la fermo
- 159 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: 300 en la 33a, Nova Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
- 160 Kongreseroj . . .

La kovrilo

En la supra bildovico, de maldekstre: La Ĝenerala Direktoro de Unesko faras sian 40-minutan paroladon al la kongresanoj, kiuj — sur la dua bildo — atentas pri ĉiu lia vorto, ĉar lia parolado ne konsistas el simplaj afablaĵoj, sed li prezentas gravan mondan problemon al kompetenta internacia forumo; d-ro Tonkin mienas kontente. Li faras tion plenrajte, kiel reĝisoro de la spektaklaj atingoj de UEA en la lastaj tri jaroj, kiel homo kiu gvidos nin al novaj sukcesoj en la sekvantaj tri jaroj. En la dua bildovico de maldekstre: La Prezidanto de Islando atente sekvas la Solenan Inaŭguron; teatraĵo sur la kovrilo, tio celas esti maksimuma noto por la majesta prezentaĵo de Nacia Teatro de Islando. La koloro de la kovrilo celas simboli maturiĝon, kiun la Esperanto-movado montris en la 62a Universala Kongreso en Rejkjaviko.

(Pro la kovrilaj kaj aliaj fotoj en ĉi tiu numero, ni dankas i.a. al Ada Fighiera-Sikorska kaj al Kurt Greutert).

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Mińsk, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.



62a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, REJKJAVIKO 1977 07 31 – 08 06

Perlo en la kongresa koliero

KIAM ONI VENIGAS mil homojn al la ĉefurbo de Islando, tio signifas invadon de ĉi tiu ŝtato sen soldatoj. La 62a Universala Kongreso de Esperanto, inter la 31a de julio kaj 6a de aŭgusto 1977, kun 1197 aliĝintoj, estis ĝuste tia invado, ĉar la kongresanoj kelkprocente pligrandigis la feritempan loĝantaron de la plej norda ĉefurbo en la mondo. La Movado unuafoje kunvenis en lando, kie la Kongreso efektive estis ĉeftemo de la publika kaj kultura vivo de la lando.

Havi en la Kongreso la ĉeestoprivilegion de la plej alt-ranga ŝtata funkciulo, d-ro Kristján Eldjárn, ŝtatprezidanto, estas malofte spertita honoro. Sed, havi samtempe ankaŭ la Ĝeneralan Direktoron de Unesko, s-ron Amadou-Mahtar M'Bow, tio signifas plenumiĝon de jardekojn longaj movadaj revoj. La Prezidanto de Islando pasigis kun la kongresanoj iom malpli ol kvar horojn; la Ĝenerala Direktoro de Unesko elektis ĝuste nian Kongreson por liveri sian plej signifan paroladon pri la komunikado en la hodiaŭa mondo. Li krome renkontiĝis plurfoje kun movadaj funkciuloj kaj estis gastito en speciala tagmanĝo kun trideko da esperantistoj. La Kongreso en Rejkjaviko estas pruvo, ke la prestiĝo de la Internacia Lingvo kaj UEA, kiel ĝia ĉefa organiza portanto, atingis nivelon ĝis nun ne spertitan. En la

impone longa vico de Universalaj Kongresoj, Rejkjaviko estas la plej brila perlo de tiu koliero. Ĝi tion meritas ne nur pro la prestiĝaj trajtoj de la aranĝo, sed ankaŭ pro pluraj aliaj aspektoj, kiujn ni traktas tra la paĝoj de ĉi tiu numero.

Unu el la specifaj trajtoj de la 62a UK estas la fakto, ke ĝi eble unuafoje en la riĉa kongresa historio sukcesis starigi veran dialogon kun la kongresa lando, kies funkciuloj kaj fakuloj rolis en la kongresa programo apenaŭ malpli ol la movadanoj.

Nia Kongreso ja estas unu el la plej imponaj internaciaj eventoj okazintaj en Islando. Tamen, Islando montriĝis pli ol preta digne gastigi nin kaj regali ne nur per la spirhaltigaj unikeco kaj belo de siaj pejzaĝoj, sed ankaŭ per veraj spiritaj malkovroj, kiaj estis la majstra prezento de *Inuk* kaj partoj de la kongreslanda vespero. Kiam ni estonte serĉos novajn lokojn por niaj kongresoj, ni serĉu novajn Islandojn. Ne gravas, se ilia Movado estas malforta, ĉar la Kongreso generos kaj multobligos tiujn fortojn. Rejkjaviko kun sia malmultnombra LKK estu nia definitiva kuraĝigo tiurilate. La decido kongresi en Islando estas unu el la plej senriproĉaj trafoj en la kongresa historio. Laŭ pluraj vidpunktoj, la 62a UK restos dum longa tempo – modelo por sukcesi.



Inaŭgura vico de eminentaj parolintoj (de maldekstre): V. Hjalmarsson, B. Ragnarsson, B. Ísleifur Gunnarsson kaj R. Harry.

SOLENA INAŬGURO DE LA 62a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Inaŭguro, la plej solena

La 31an de julio 1977, inter la 10h05 kaj 11h50, en la Universitata Koncertejo de Rejkjaviko okazis la plej impona solenaĵo en la tuta longa historio de la Universalaj Kongresoj de Esperanto. La Solena Inaŭguro de la 62a UK restos modelo prestiĝe kaj organize por multaj jaroj antaŭ ni.

SOLENAJ INAŬGUROJ kutime havas tagordon, kiun la Estraro pretigas lastmomente, kiam oni disponas la definitivajn informojn pri tiuj kiuj venos, ĉeestos kaj parolos. La Solena Inaŭguro de la 62a UK havis tre detalan scenaron, "ekverkitan" jam antaŭ du jaroj kaj kompletigintan plurajn monatojn antaŭ la Kongreso: jam en januaro estis konate, ke la Prezidanto de Islando d-ro Kristján Eldjárn, la Alta Protektanto de la Kongreso, ĉeestos la Inaŭguron; en aprilo ĉi-jare la Estraro informiĝis, ke al la Kongreso venos la Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ro Amadou-Mahtar M'Bow. Tiel longe planita solenaĵo povis nur sukcesi kaj fariĝi unu el la plej grandaj rekonoj al la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.

Jam longe antaŭ la 10a matene, en la solene ornamita salono restis ne okupitaj nur la unuaj tri seĝovicoj. Je la 10a eniris la altrangaj gastoj, kompletigis la Kongresa Prezidantaro sur la podio, kaj d-ro Werner Bormann petis la ĉeestantojn stariĝi por la eniro de la ŝtatprezidanto. Kiam la Alta Protektanto, kun la edzino kaj akompanantoj, sidiĝis meze de la unua vico, kie jam estis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, eksonis la malfermaj vortoj de d-ro Tonkin, kiu diris i.a. jenajn vortojn pri la kongresa lando kaj ĝia popolo:

"Hodiaŭ, en lando geologie ankoraŭ naskiĝanta, la islandanoj retenas firme sian konscion pri la propra origino. Ili estas ligitaj per seninterrompaj fadenoj al la unuaj skandinavaj alvenintoj. Ilia kulturo estas aparta, speciala — kaj ili fieras pri tiu unika kontribuo

al la sumo de mondaj kulturoj. Samtempe, tamen, Islando estas lando malferma al la mondo — kun moderna industrio, kun scivolemo pri la nuntempa tekniko, kaj kun reputacio kiel respondeca monda civitano. Tiu kombino de malfermiteco ..., kun samtempa konscio pri la aparteco de la propra kulturo, estas idealo bone konata al la parolantoj de Esperanto, kiuj emfazas la uzadon de neŭtrala internacia lingvo ne nur por faciligi la tutmondan komunikadon sed ankaŭ por ŝirmi la diversajn naciajn lingvojn kontraŭ la atencoj de aliaj naciaj lingvoj. Pro tio, neniel surprizas nin, s-ro Prezidanto, ke la islandanoj simpatie rilatas al la Internacia Lingvo. Ni niaflanke reciprokas tiun simpatian."



La Alta Protektanto d-ro Kristján Eldjárn kun sia edzino (meze) ĉeestis la tutan Inaŭguron de la 62a UK.

Post mallonga saluto de la prezidanto de LKK s-ro Baldur Ragnarsson, venis la unua granda surprizo en la solenaĵo: La kulturministro de Islando s-ro Vilhjálmur Hjálmarsson, nome de la registaro, eldiris sian tutan paroladon (v. la tekston sube) en la Internacia Lingvo. Sekvis s-ro Birgir Ísleifur Gunnarsson, urbestro de Rejkjaviko, kun pli longa parolado, eldirita en same bona kaj klara Esperanto. Li diris, interalie:

”Lingvo-instruado estas eksterordinare multokupa en la islandaj lernejoj kaj tempopostula al la gelernantoj. Ĝuste pro tio ni islandanoj bone komprenas, kiel grandega problemo la diverslingveco estas en la interpopola komunikado. Ni tial aparte kaj emfaze ĝojas pro tio, ke ekzistas organizaĵo, kiu celas la instruadon kaj disvastigadon de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu povus servi al la celo interproksimigi la popolojn kaj plifaciligi al ili forigi nekomprenon kaj miskomprenojn inter si. ... Internacie neŭtrala lingvo, kia estas Esperanto, estas granda paŝo en tiun direkton.”

Aŭskultar te tiujn du paroladojn en Rejkjaviko, oni ne povis eviti la pensojn, ke la esperantistaro iam jubilis pro la fakto, ke triaranga diplomacia oficisto faris etan penon por fine de sia kliŝa afablaĵo eldiri du aŭ tri vortojn en la Zamenhofa lingvo aŭ io, kio estus devinta simili al Esperanto. Tio ne okazis antaŭ epokoj, sed nur antaŭ kelke da jaroj. Nun la islandaj altranguloj starigis novajn normojn tiurilate. Ili eldiris siajn longgetajn paroladojn ne nur en Esperanto perfekta fonetike, sed ankaŭ enhave. Estis kvazaŭ iu el la movadaj aktivuloj simple leviĝis kaj, post aserto, ke li estas kulturministro de Islando aŭ urbestro de Rejkjaviko, komencis laŭtigi niajn proprajn pensojn, per niaj propraj vortoj.

Aŭstralia ambasadoro en Unuiĝintaj Nacioj s-ro Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de

UEA, tiam prezentis al la ĉeestantoj la kongresan ĉeftemon ”La rajto je komunikado”. Li faris tion mallonge kaj per surprize simpla eleganto, lasante nin unuplian fojon miri, kial tiu pinta diplomato, kutimiĝinta al la vortaj piroteknikaĵoj de sia profesio, en siaj movadaj alparoloj ĉiam restas inter la plej entuziasmaj zamenhofanoj.

Tamen, la ĉefa evento de la rejkjavika Solena Inaŭguro kaj de la tuta Kongreso sekvis nur post muzika intermezo (Mozart: Divertimento n-ro 1, en altnivela plenumo de la Blovista Trio de la Nacia Simfonia Orkestro). La prezidanto de UEA anoncis la parolvicon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, kion la kongresanoj renkontis per longa entuziasma aplaŭdo, konfirmanta ke oni atestas la plenumiĝon de



S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, en la Inaŭguro de la 62a UK: Ĉi tie la lingva problemo estas solvita?! (Ĉu pro tio la malfido al la okulvitroj?)

**VILHJÁLMUR HALLGRÍMSSON,
KULTURMINISTRO DE ISLANDO:**

Oraj promesoj de la esperantistoj

LA MONDO estas granda kaj la homaro multnombra. El la vidpunkto de malgranda nacio la mondo ŝajnas eĉ ankoraŭ pli granda.

En fama poemo de la plej ŝatata islanda poeto, Jónas Hallgrímsson, troviĝas la sekvantaj versoj: *Altajn stelojn / ĉielmar' disigas. / Klingo tranĉrandon kaj dorson / Sed amajn spiritojn / eĉ ne eterneco / disigi povas.* Oceanoj profundaj kaj vastaj disigas landojn kaj kontinentojn. Samon faras ankaŭ montoj kaj riveroj kaj pliaj ”naturaj landlimoj”. Sed estas ankoraŭ pli multaj aferoj, kiuj disigas popolojn: malsamaj haŭtkoloroj, malsimilaj kutimoj, diferencaj kulturoj, kaj, laste sed ne malplej grave, multegaj kaj malsimilaj lingvoj.

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la laste menciitan baron kontraŭ liberaj kaj vivantaj kontaktoj inter homoj kaj nacioj tra la tuta mondo.

La cititaj versoj pri diseco kaj kuneco estas kvazaŭ simbolo de la gigantaj taskoj kaj oraj promesoj de la esperantistoj.

Estimataj gesinjoroj, vi nun faras viziton al unu el la plej malgrandaj popoloj de la mondo. Nia lando situas sur latitudoj ne multe okupitaj, kaj, krome, ĝi estas insulo en la ekstrema nordo de norda oceano. Eble ĝuste tial vi vidos ion kaj ion, kio impresos vin kiel neordinara kaj rimarkinda, ĉar ”klare vidas la gasta okulo”, kiel diras islanda proverbo. Ni, la hejmanoj, esperas, ke niaj fremdaj gastoj ĝuos ĉi tie tagojn belajn kaj memorindajn. En la nomo de la islanda registaro mi varmkore bonvenigas vin.

Sed unue kaj laste mi volas esprimi tiun mian esperon kaj sinceran deziron, ke tiu ĉi kongreso portu la Esperanto-movadon pli proksimen al tiu ĝia celo: doni al la tuta homa mondo komunan lingvon por la bono kaj beno de vivantoj kaj vivontoj.

unu el la grandaj revoj de la Esperanto-movado. Estis nova kongresa sperto noti la maksimuman atenton per kiu la ĉeestantoj, helpe de Esperanta traduko, pri kiu disponis ĉiu el ili, sekvis la franclingvan paroladon de la ĉefa funkciulo de nia plej proksima monda organizaĵo. Tiu signifa parolado aperas en sia tuteco sur la sekvaj paĝoj de ĉi tiu revunumero.

Sekvis salutoj al la plej altrangaj gastoj, inter kiuj troviĝis pluraj membroj de la Honora Komitato, altranguloj de la islanda registaro, parlamentanoj, gvidantoj de islandaj kulturaj kaj aliaj publikaj institucioj. Apartan saluton ricevis d-ro Thorstein Thorsteinson, eksdirektoro de la ŝtata statistika oficejo, pioniro de la islanda Esperanto-movado. Kvankam en Rejkjaviko troviĝas nur manpleno da diplomatiaj reprezent-ejoj, la nombro de la ĉeestantaj diplomatoj kaj precipe ilia altrangeco estis imponaj: Aŭstrio (s-ro L. Siemsen, ĉefkonsulo), Britio (s-ro M. Kendall, unua sekretario de la ambasado), Ĉeĥoslovakio (s-ro K. Krische, aferŝarĝito), Ĉina Popola Respubliko (s-ro Liu Keng-yuan, unua sekretario), Francio (s-ro J. De Latour Dejean, ambasadoro), FR Germanio (s-ro K.-H. Krug, aferŝarĝito), Germana DR (s-ro G. Spitzl, aferŝarĝito), Hungario (s-ro I. Kutas, pensiita ambasadoro), Norvegio (s-ro S. E. Svedman, ataŝeo, kaj kapitano R. Bugge-Paulsen), Pollando (s-ro A. Szymanowski, aferŝarĝito), Soveta Unio (s-ro G. Farafov, ambasadoro), Svislando (s-ro S. Stefansson, nome de la konsulo), Usono (s-ro L. Martin, vicdirektoro de la ŝtata informservo). Krome, siajn bondezirojn al la Kongreso sendis la forestanta ĉefministro de Islando s-ro Geir Hallgrímsson, membro de la Honora Komitato, kaj kelkaj ambasadoj (Finnlando, Svedio k.a.). Granda estis la nombro de la internaciaj organizaĵoj (ĉ. 15), kiuj sendis skribajn salutojn al la 62a UK. Inter ili troviĝis: La Universitato de Unuiĝintaj Nacioj en Tokio, Universala Poŝta Unio, Internacia Unio de Telekomunikado, Eŭropa Alianco de Gazeteldonejoj, Internacia Instituto de Komunikado, Monda Pac-Konsilio, Atlantika Instituto por Internaciaj Studoj k.a.

La Inaŭguro finiĝis per transdono de memoriga donaco al la Ĝenerala Direktoro de Unesko, kiu post sia parolado restis sur la prezida podio. Tiuokaze d-ro Tonkin diris: "La fakto, ke Unesko rekonas nian agadon, estas per si mem instigo al pli forta laboro. Mi esperas, ke per la nuna kongreso vi pli firme konvink-iĝos, ke Esperanto estas ne nur portanto de gravaj kulturaj valoroj, sed ankaŭ fenomeno socie utila kaj rekta ligilo inter diverslingvanoj.

Via ĉeesto inter ni gravas al ni precipe pro tri kialoj. Unue, vi portis al ni gravajn ideojn kaj opiniojn pri la ĉefa temo de nia kongreso. Due, ni havis okazon montri al vi la laboron de UEA, organizo en konsultaj rilatoj kun Unesko. Trie, ni havis okazon montri al vi la utilecon de Esperanto — afero pli grava kaj pli vastsignifa ol la ekzisto de nia Asocio. Finfine, ni estas simple organizo, kiu uzas kaj disvastigas Esperanton, sed Esperanto estas potenciale la posedaĵo de ĉiu homo de bona volo."

PAROLADO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO EN LA 62a UK EN ISLANDO:

Vin motivas respekto al kultura diverseco kaj deziro de interproksimiĝo

Sinjoro prezidanto, gekongresanoj, gesinjoroj, ESTAS AGRABLE kapti la okazon de mia oficiala vizito al Islando por alparoli vin en la Inaŭguro de la 62a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Mi volus tre sincere danki al la prezidanto de la Asocio, s-ro Tonkin, pro lia afabla invito.

Vi elektis, gesinjoroj kongresanoj, okazigi vian Kongreson pri la temo "La rajto je komunikado". Tio estas temo, kiu interesas Uneskon pro pli ol unu kialo, ĉar komuniki ja estas interkompreniĝi.

Universala lingvo — esprimo de idealo

Unu el la plej esencaj taskoj de Unesko, laŭ ĝia statuto, estas la plifortigo de la mondpaco, la komprenemo inter la popoloj kaj la kunlaboro inter la nacioj. Esperanto historie fontas el la sama principo. D-ro Zamenhof, entuziasma inventinto de tiu lingvo, estis profunde ĉagrenita dum sia juneco pro la apartiĝoj, kiujn la diverslingveco povis kaŭzi en la sino de komunumo. Li konvink-iĝis, ke nur la ebleco de senpera komunikado povus revenigi la pacon inter la homoj, kaj, ke estas necese krei universalan lingvon sufiĉe kompletan, neŭtralan kaj alireblan por ĉiu homo. Esperanto, li diris, ne konas nacion malfortan aŭ fortan, privilegiitan aŭ malsuperan.

La revo pri universala lingvo aperas do kiel esprimo de idealo — vidi, dank' al la uzo de komuna lingvo, forigon de ĉiuj malakordoj inter la homoj.

Hipotezon pri artefarita lingvo jam en la 17a jarcento menciis Descartes kaj precipe Leibniz, kiu tra sia admiro al *Ars Magna* de Raymundus Lullus reprenis projekton ligitan, en la komenco, al la ideo de filozofia alfabeto kiel ĝi evoluis en la Oriento. La ardo, per kiu la eminenta logikisto Louis Couturat defendis Esperanton, atestas pri la interesiĝo, kiun tiu demando lev-is inter la filozofoj kaj la sciencistoj.

Esperanto havigis al si la historian sperton

Tamen, se la serĉado de internacia lingvo konkretiĝis en la logika lingvo, tra kiu esprimiĝas la nunaj sciencaj fakoj, Esperanto trovas sian fonton, empirie, en la ekzistantaj lingvoj, precipe la latinidaj kaj ĝermanaj, kiujn, cetere, ĝi ne pretendas forigi. Ĝi aspiras fariĝi **helplingvo**, kiu, aldone al la naciaj lingvoj, kiuj es-

primas la penson kaj la specifajn valorojn de ĉiu popolo, ofertus al la homaro la eblecon disponi pri komunikilo utiligebla almenaŭ en unu tuta regiono. La sciencistoj, kiuj neniam ĉesis kuraĝigi per sia subteno aŭ partopreno la evoluigon kaj disvastiĝon de Esperanto, daŭre substrekis la **helpan** karakteron de tiu rimedo de komunikado. Al tiu alianco de logiko, modesto kaj fervoro Esperanto ŝuldas la fakton, ke ĝi estas inter la multnombraj projektoj de internacia lingvo tiu, kiu havigis al si la historian sperton plej daŭran, kio ne estas ĝia malplej granda merito.

Tamen, la tiel grava lingva problemo estas nur unu el la aspektoj de la komunikado.

Pro tio, Unesko okupas sin en longdaŭra agado, kiu, trapasante la klarigon pri la koncepto de la komunikado, celas transformi la praktikon por fakte ebligi al ĉiuj la rajton je komunikado.

Dum sia dekokaj kunsido, en 1974, la Ĝenerala Konferenco de Unesko ŝarĝis min studi, en konsulto kun la ŝtatoj-membroj kaj la profesiaj organizaĵoj, la koncepton de la rajto je komunikado.

Rekoni la valoron de kultura pluralismo

En la momento kiam oni pli kaj pli konstatas la fundamentan gravecon de komunikado en demokrata socio, kaj kiam la grandskalaj progresoj de la scienco kaj tekniko malfermas gigantajn eblojn al la homoj, la strebo al nova ordo en la mondo koncernas samgrade la komunikadon kiel la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn aferojn. Hodiaŭ oni komencas rekoni la valoron de kultura pluralismo kaj la gravecon por la monda kolektivo konservi la kulturan integron de



S-ro Amadou-Mahtar M'Bow parolas al la kongresanoj en Rejkjaviko: Ne temis pri kutimaj afablaĵoj, sed pri prezento de monda problemo al unika internacia forumo.

ĉiu popolo. La emfazo pri kultura identeco, bazita sur la rekono de la specifeco kaj egaleco en digno de ĉiuj kulturoj, ne malpermesas fruktodonajn rilatojn. Estas, male, per kontaktoj kaj interŝanĝoj, ke la diversaj kulturoj riĉigas unu la alian. Do, kiel atingi tion, dum la ebleco komuniki ne estas je dispono de ĉiuj, individue kaj nacie? Jen la graveco de plena realigo de la rajto je informado, proklamita en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

Komunikado estas dudirekta procedo

Ĉar ne temas nur pri garantio al la popoloj de la ebleco aliri kaj utiligi la komunikrimedojn; temas ankaŭ pri certigo de plena reciprokeco de la informfluo interne de la sama nacio aŭ sama komunumo, kaj ankaŭ inter ĉiuj regionoj de la mondo. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implicas la eblecon informi kaj informiĝi.

Por garantii kaj la liberecon kaj la ekvilibron de la cirkulado estas esence ke la diversaj partneroj, sinsekve elsendantoj kaj ricevantoj, disponu pri rimedoj, kiuj ebligas veran dialogon.

La nuna malegaleco en la posedo kaj uzado de la informaj rimedoj konsistigas do defion tutmondan, kiu ne povis lasi Uneskon indiferenta. Efektive, ĝia statuto devigas favori la konatiĝon kaj la reciprokan komprenemon inter la nacioj, donante sian helpon al la amasaj informiloj kaj tiucele rekomendante tiujn internaciajn kontraktojn, kiujn ĝi juĝas utilaj por faciligi la liberan cirkuladon de ideoj per vortoj kaj bildoj.

Ne trudi specifan politikon, sed helpi difini la vojojn

Unesko tial ofte intervenis por adoptigi serion de normoj internaciaj. Ĝi donas sian helpon al la ŝtatoj-membroj, kiuj volas ellabori nacian politikon pri komunikado. Sed Unesko nek havas, nek povas havi specifan politikon pri komunikado, kiun ĝi trudus al la ŝtatoj-membroj je nacia nivelo. Tiuj elektas la vojon, kiu ŝajnas plej konforma al la propraj aspiroj. Tio, kion Unesko povas fari por ilin helpi, estas instigi la diskutadon, favori interŝanĝon de spertoj kaj kun ili difini la vojojn, kiuj plifortigos la internacian kunlaboron.

Unu el la gravaj stadioj en tiu agado de efektiva alproksimigo inter la popoloj estas la organizado de regionaj konferencoj pri la komunikadpolitikoj. En San José (Kosta-Riko) dum la unua el tiuj konferencoj, okazinta en julio 1976, kun partopreno de reprezentantoj de la latinamerikaj kaj karibaj landoj, la "rajto je komunikado" troviĝis en la kerno de la diskutoj. Okazis ja debatoj riĉaj kaj kompleksaj, ĉar temis pri relative nova koncepto, kiu esprimas la novajn dimensiojn, kiujn la evoluado de la tekniko kaj de la ideoj donis al la koncepto pri la rajto je informado, proklamita en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de 1948. La partoprenantoj adoptis unuanime la "Deklaracion de San José", kiu substrekas, ke "La homoj havas la rajton aliri

ĉiujn kulturajn riĉaĵojn kaj partopreni, en libera kaj demokratia maniero, en la diversaj esprimiĝoj de la homa spirito”.

Kreskigi la sociemon de la homo

Fakte, la plena efektivigo de la rajto je komunikado, se ĝi garantias la aliron kaj partoprenon de la popolo en la komunikado, devas permesi ankaŭ kreskigi la sociemon de la homo, kuraĝigi la kritikan pripensemon kaj precipe stimuli la individuan kaj kolektivan kreemon kiu estas unu el la kondiĉoj por evoluado. Dum 1975, Unesko faris ĉe la ŝtatoj-membroj internacian enketon pri la rajto je komunikado. Tre riĉaj pro la diverseco, la respondoj montris grandan konverĝon de la ideoj. Ĝenerale, oni rekonis la respondecon kaj la devojn de la amaskomunikiloj rilate al la socio, kaj la gravecon de la aliro je informado kaj la efektiva uzado de la rajto informi kaj informiĝi. Estis ankaŭ substrekite, tamen sen ŝovinismo, ke oni devas konservi la integrecon de la kulturoj kaj ke estas nepre necese por ĉiu lando diskonigi siajn opiniojn kaj esti aŭdata je internacia nivelo.

Superfluas diri, ke la problemoj tiel levitaj tute ne estas simplaj. Pro tio, Unesko klopodas samtempe pli bone difini la sencon kaj la implicojn de la rajto je komunikado, tiel kiel ĝi estas perceptata en malsamaj kulturoj kaj sociekonomiaj sistemoj, kaj precipe favori grandskalan debaton kaj studojn pri la tuta tiurilata problemaro.

Historia kaj kultura perspektivoj, ekzameno de la teknologiaj implicoj kaj la filozofiaj, juraj kaj politikaj aspektoj, influo sur la socio, nuna stato de la inform-



Pli ol unu kialo por intensigi la kunlaboron inter Unesko kaj UEA: La Ĝenerala Direktoro parolas al d-ro P. Denoël.

kanaloj kaj formulado de politikoj pri komunikado — tiuj ŝajnas esti kelkaj el la esencaj demandoj, kiujn oni devas plustudi por pli bone kompreni la problemon de la rajto je komunikado.

Unesko volas intime kunlabori kun la ne-registaraj organizaĵoj

Pro tio, en la kadro de sia longdaŭra studprogramo, Unesko volas intime kunlabori kun ĉiuj siaj ŝtatoj-membroj, kun naciaj, profesiaj kaj universitataj in-

Rezolucio

DE LA 62a UNIVERSALA KONGRESO

La partoprenantoj en la 62a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenintaj de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1977 en Rejkjaviko (Islando),

- konstatante kun kontento la iniciaton de Unesko esplori la kompleksan problemaron de la ”rajto je komunikado”;
- esprimante sian esperon pri pluaj progresoj en la realigo de la Fina Akto de Helsinki, speciale sur la kampo de samrajta internacia komunikado;
- aŭskultinte kun granda interesiĝo la gravan paroladon de la ĝenerala direktoro de Unesko s-ro Amadou Mahtar M’Bow, dum la Inaŭguro de la Kongreso, pri la menciita temo;
- substrekante la gravecon de la lingva aspekto de la komunikado, speciale en internaciaj rilatoj, aspekto ĝenerale ne sufiĉe atentata;
- avertante pri la fakto, ke en la hodiaŭa mondo centoj da lingvoj kaj ties kulturoj estas minacataj de estingiĝo pro diskriminaciaj komuniksitacioj;

- diskutinte en pluraj aranĝoj dum la Kongreso la diversajn aspektojn de la komunikado, speciale la lingvajn barojn al la plena efiko de la rajto je komunikado; proponas al la landaj Esperanto-asocioj:

- daŭre atenti pri la celoj kaj agadoj de Unesko, precipe sur la kampo de internaciaj kulturaj interŝanĝoj;
- speciale okupiĝi pri la rajto je komunikado, en kunlaboro kun la landaj Unesko-komisionoj;
- montri, per konkreta internacia kultura agado, responda al la celoj de Unesko kaj al tiuj de UEA, la utilon de la Internacia Lingvo por samrajta internacia komunikado;

komisias al la Estraro de UEA:

- per taŭgaj dokumentoj informi pri la rezultoj de la pritraktado de la kongresa temo Unesko-n, ties ŝtatoj-membrojn, la ĝeneralan sekretarion de UN kaj la ŝtatojn subskribintajn la Finan Akton de Helsinki;
- esprimi al Unesko la urĝan senton de la esperantistaro pri la neceso pli profunde esplori la lingvan aspekton de la rajto je komunikado kaj la rolojn de internacia lingvo en la evoluigo de nova monda komunik-ordo;
- proponi la helpon de UEA kaj ĝiaj specialaj organoj en tiu esplorado.

stitucioj kaj kun la neregistaraj organizaĵoj por kuraĝigi ĉie la studadon kaj la pridiskuton.

Multaj studoj viciĝas en tiu programo. Ili temas pri:

- studo de la rolo kaj procedoj de komunikado en la socio kaj la internacia cirkulado de la informoj;
- agadoj eksperimentaj pri la evoluigo de komunumaj amaskomunikiloj, plibonigo de la aliro al la informkanaloj kaj ekipaĵoj de la amaskomunikiloj;
- pristudo de iniciatoj destinitaj garantii la homajn rajtojn;
- la antaŭenigo de libera kaj ekvilibra interŝanĝo de informoj, de politikoj, de infrastrukturoj kaj de la edukado rilate la komunikadon;
- pristudo de la perspektivoj de la komunikado inter nacioj kaj la koncernaj malhelpoj, konsiderante precipe la uzadon de novaj teknologioj, kiel radiodissendo per satelitoj.

Unesko estas do devigita, pro la komuna volo de siaj ŝtatoj-membroj, okupiĝi pri konsideroj, kiuj tuŝas la kernon de unu el la grandaj problemoj de la nuna mondo: krom tiu de informado, estas la problemo ebligi al la homoj **komuniki**. Ĉar oni povas 'esti informita' kaj tamen ne 'komuniki', kaj kelkaj esploristoj eĉ subtenas la tezon, ke en la kazo de la industriaj landoj ĝenerale ju pli oni 'konsumas informojn' des malpli oni vere komunikas kaj des pli oni bezonas komuniki.

Post la entreprenita esploro pri la tuto de la problemoj pri komunikado en la moderna mondo, Unesko esperas vidi la realigon de interkonsento pri tio, kio devas esti la celo kaj la kialo de la komunikado en la mondo kaj pri la rimedoj, per kiuj la internacia komunumo povus kreskigi sian agadon por fari el la komunikado rimedon unuarangan por progresigo de la popoloj kaj kompreno inter la nacioj.

Pripensi la barojn de lingva diverseco kaj la rimedojn venki ilin

Gekongresanoj, la celo, kiun via Kongreso alprenas, diskutante pri la rajto je komunikado, pri la obstakloj al la apliko de tiu rajto, precipe la lingvaj



La entuziasmo pri la plej altnivela reprezentiĝo de Unesko en Rejkjaviko estis ambaŭflanka: La prezidanto de UEA prezentas donacon al s-ro A.M. M'Bow en la Inaŭguro.

baroj, estas do en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo.

Ĉar, dum la obstakloj al universala cirkulado de la penso kaj de la ideoj ĉiam ekzistis, la komunikado inter popoloj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj ĉiam ŝajnis esti idealo eminente dezirinda kaj atinginda. Hodiaŭ ĝi montriĝas kiel necesa en mondo, kie senĉese emfaziĝas la interdependo de ĉiuj homoj. La emfazo pri liberaj pensado kaj esprimo estas nepre fundamenta, sed ni devas ankaŭ krei sen ia diskriminacio la kondiĉojn, kiuj ebligas tion.

Gesinjoroj, ĉiuj lingvoj estas egalaj laŭ digno kaj kiel iloj de komunikado, eĉ se ekzistas diferencoj rilate la skalon de ilia disvastiĝo. Neniu el ili estas nature mondskala; ĉiu reprezentas propramaniere sperton, realigon, unikan paŝon en la progreso de la homo. Tiel, en tiu ĉi tempo, kiam ekzistas tiom da teknikaj eblecoj por estigi aŭ kreskigi la dialogon, la homoj devas pripensi la barojn, kiujn konsistigas la lingva diverseco kaj ankaŭ la rimedojn por venki tiujn barojn.

Konsciigo pri la fakto, ke komunikado estas potenco

En 1974, studo de Unesko montris la ekstreman malabundon de esploroj pri la transkultura komunikado kaj pri la obstakloj, kiuj kontraŭas la evoluigon de tiu komunikado: kulturaj diferencoj, psikologiaj baroj malebligantaj la komprenon, manko de komuna lingvo ktp. Dum la pasintaj jaroj, la debato pri transkultura komunikado tiom pliintensiĝis, kiom kreskis la ebleco de rekta dissendo trans la landlimoj. En la kerno de la debato troviĝas la konsciigo pri la fakto, ke komunikado estas potenco. Kelkaj eĉ asertas, ke ĝi estas "la potenco". Regi naciajn sistemon de informado povas ebligi al certaj interesoj influi la procedon de decidfarado en la socio, eĉ influi la kulturajn kaj politikajn valorojn, kiuj firmigas ĝian unuecon. Tio emfazas ankoraŭfoje la gravecon de la temo, kiun vi debatos.

Permesu al mi fini, reprenante ideon, kiun mi esprimis en la lasta ĝenerala konferenco de Unesko, lastan novembron en Nairobi. Temas pri la graveco, kiun havas — kun perspektivo al la transformado de la rilatoj inter nacioj — informado, kiu agnosku laŭ ekvilibra maniero la poziciojn de ĉiuj partneroj.

La demando pri informado estas nun aktuala. Ŝajnas, ke ĝi restos tia dum la venontaj jaroj, ĉar ĝi estas intime ligita al tiu rajto je komunikado, kiu — por esti plene uzata en la kadro de kunlaboro sur egala bazo inter la nacioj — necesigas la rekonon de la rajto je kultura diverseco.

Sinjoro prezidanto, gekongresanoj,

Mi certas, ke estas samtempe tiu respekto al la kulturaj diversecoj kaj tiu deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj motivas vin. Estas pro tio, ke mi esprimas tre sincerajn bondezirojn por ke la laboroj de via Kongreso estu kaj fruktodonaj kaj pozitivaj.

Amadou-Mahtar M'Bow

Esperanto trovis sian strategion

Eĉ se sonas strange havi apartajn inaŭguron kaj malfermon — kion oni aplikis por la tria fojo ĉi-jare —, praktikaj avantaĝoj estas evidentaj: efikeco kaj soleneco. En la Malfermo salutis 34 landaj E-movadoj; duono el ili delegis la taskon al junaj homoj. Parolis ankaŭ reprezentantoj de SAT kaj kelkaj fakaj asocioj. La ĉefa ero de la tagordo estis ĉi-sekva (iom koncizigita ĉi tie) parolado de d-ro Humphrey R. Tonkin.

LA INAŬGURA SOLENAĴO ĉi-matene montras pli elokvente ol ĉiuj vortoj, kiujn mi nun povus diri, la progreson, kiun ni kune faris dum la pasintaj du-tri jaroj. La ŝtato, en kiu nia Kongreso okazas, rigardas tiun ĉi unikan manifestiĝon de nia internacia kulturo tiel grava, ke ĝian inaŭguron ĉeestis la Prezidanto de la Respubliko mem. Alparolis la Kongreson la Ministro pri Kulturo ne per la afablaj protokolaĵoj, iom oftaj en tiaj eventoj, sed per esprimoj de tuktora simpatio, des pli fortaj pro tio, ke ili estis eldiritaj en la Internacia Lingvo mem. Kaj kiel fadeno tra ĉiuj niaj rilatoj kun la islanda registaro etendiĝas unu komuna karakterizo: la konstato, ke Esperanto estas afero serioza, inda kaj — eble plej grave — ia garantiilo de kultura pluralismo en mondo kie tiu pluralismo estas ĉiutage minacata.

La parolantoj de Esperanto argumentas, ke Esperanto donas du grandajn avantaĝojn al la homaro. Unue, ĝi plifortigas la ligojn inter la diversaj popoloj, ebligante pli altan nivelon de kompreniĝo kaj kunlaboro. Surbaze de tiu konstato la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1954 rezoluciis simpatie al UEA kaj Esperanto, emfazante speciale la internacian kompreniĝon. Due, Esperanto funkcias kiel garantiilo kontraŭ diskriminacio kultura kaj lingva — do ĝi garantias diversecon per senpartia ŝirmado de la lokaj kaj naciaj kulturoj. Tiu unua demando — la homa interkompreniĝo — estas jam de multaj jaroj politike aktuala, sed ĝi sola ne vekas tiun intensan intereson en la nuna tempo, kiun vekas la demando pri diskriminacio kaj pluralismo. Sekve, sukcesa agado por enkonduki Esperanton, por vekadi la intereson de la ŝtatoj, kuŝas en la ĝusta kombino de la du demandoj: la internacieco unuflanke kaj la lokaj valoroj aliflanke. Jam de pluraj jaroj tiuj du aspektoj de Esperanto ludis rolon en la eksteraj rilatoj de UEA, sed lastatempe ni sukcesis kombini ilin en pli dinamikan rilaton. Tial ni en aprilo pretigis komenton pri la Fina Akto de Helsinko kaj ĝin ekspedis al ĉiuj subskribintaj registaroj;

tial ni komencis energian agadon ĉe diversaj internaciaj organizoj, ekzemple la instancoj de la Eŭropa Komunumaro, la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj — fakte ĉie, kie povas leviĝi ne nur la demando pri internacia kompreniĝo sed ankaŭ la problemaro de lingva egalrajteco. Pasintjare por la unua fojo la Eŭropa Komisiono sendis reprezentanton al nia Kongreso. Ĉi-jare la interesiĝo pri Esperanto en tiuj regionaj organizoj senteble kreskis — interalie pro nia aparta atento al iliaj problemoj en la pasintjara kongresa ĉeftemo, la regiona kunlaboro.

Ni estas sur la ĝusta vojo

Sed tra la tuta historio de Esperanto, eĉ en la tagoj de plej proksimaj kontaktoj kun la Ligo de Nacioj, kiam la Internacia Lingvo preskaŭ atingis oficialajn rekonon kaj utiligon, neniam aperis ĉe unu el niaj Universalaj Kongresoj la ĉefa funkciulo de granda internacia registara organizo. En tiu senco la alveno al la Kongreso ĉi-jare de la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro M'Bow, estas epokfara. Ĝi estas la rezulto de zorga antaŭpreparo — tri jaroj da intensa agado ĉe Unesko, kaj, tute speciale, interveno en la laboron de Unesko je ĉiuj stadioj, ne nur pri internacia kunlaboro sed ankaŭ, kaj antaŭ ĉio, pri diskriminacio — pri la neceso krei internacian kunlaboron en spirito de egaleco. Jen la ŝlosila kunligo inter la du aspektoj de Esperanto: Estas vaste kredate, ke egaleco inter la popoloj estas antaŭkondiĉo de efika kunlaboro. Sur la lingva kampo, Esperanto prezentas vojon al tiu egaleco, iasence ĝin simbolas.

Kaj ĉar ni kuraĝe kaj larĝmense prezentis nian vidpunkton al Unesko per oftaj intervenoj, komentarioj pri ĝia agado, ktp., Unesko siavice — surbaze de tiu tiel esenca antaŭpreparo en Montevideo en 1954 — propriniciate moviĝis por esplori kun ni tiun vidpunkton kaj por ekzameni de proksime la pretendojn kaj meritojn de Esperanto. Karaj gekolegoj, ni estas sur la ĝusta vojo. Esperanto engaĝiĝis kun la fluo de la eventoj kaj trovis sian strategion.

Se tiu ĉi estas momento por jubili pri laboro bone plenumita, se la vere impona esprimiĝo de bona volo flanke de nia gastiganta ŝtato kaj nia plej proksima internacia registara organizo levas niajn korojn kaj donas al ni novajn inspiron kaj kuraĝon, ni estu dankaj. Sed tiu ĉi kunsido, en kiu ni pensas pri la pasinta periodo, pri la nuna stato de Esperanto kaj pri la estonta vojo, estu ankaŭ okazo por klarvida kaj sobra pritakso de niaj fortoj kaj mankoj.

Gravegas, ke ni estu pretaj

Malgraŭ tio, ke la nuna interesiĝo pri la Internacia Lingvo fare de internaciaj organizoj estas rezulto de nia preparlaboro, tamen ni devas rekoni, ke la Esperanto-movado neniel regas, nek povas regi, la mondajn eventojn. Kvankam ni povas iel influi, iel persvadi, tamen ne estas ni, kiuj povas decidi kiam en difinita organizo la lingva problemo transiros la sojlon de ne-

tolereblo; ne estas ni, kiuj sendepende decidas kiam la lingva diskriminacio fariĝu brula demando en tiu aŭ alia tereno aŭ mondparto. Ni povas utiligi la eventojn (se ni estas pretaj) sed ni ne povas regi ilin.

Pro tio, gravegas, ke ni estu pretaj kapti ĉiujn okazojn, kiam ili prezentiĝos — kaj ekspluati ĉiujn okazojn daŭre, sisteme kaj konsekvence. Tio siavice postulas bonan, potencon kaj fidindan administradon.

Jen la kaŭzo kial en parolado post parolado, en kunsido post kunsido, en artikolo post artikolo, la nuna Estraro emfazis konstante tiun punkton. Sen forta kaj efika administrado ĉio estas perdita. Kiam ni ekoficis antaŭ tri jaroj, tiu plifortigo de la interna strukturo de la Asocio estis nia unua prioritato. Ĝi restis tia tra la tuta periodo.

Nia strategio estis kaj estas klara: redukti la kostojn, redukti la rutinajn taskojn, pli grandskale utiligi volontulan helpon kaj, fine, surbaze de tiuj paŝoj, renovigi kaj reorganizi la administran strukturon de la Centra Oficejo, por ebligi pligrandigon de la tuta skalo de la agado. Alivorte temas pri ŝparoj por produkti



Impona kaj kuraĝiga bilanco: D-ro Tonkin faras sian trian kongresan jarraporton.

novan kapitalon kaj investo de tiu kapitalo por enpenetri novajn kampojn, kiuj ankaŭ siavice produktos enspezojn. Jen, do, la strategio — simpla, saĝa kaj esence realigebla.

En tri jaroj la Kapitalo kreskis 75%

Ni komencis per ŝparoj. Kiam ni ekdeĵoris en 1974, UEA estis en stato malprofita. Ni sukcesis interne de unu jaro — kaj sen signifa reduktado de la agado — ŝanĝi malprofiton en gajnon de 26 000 guldenoj. 26 000 guldenoj estas proksimume 7% de la tutaj enspezoj. En 1976 ni ripetis tiun atingon, denove per profito de proksimume sama sumo. Samtempe ni lanĉis la Financan Programon de la Esperanto-Movado por plifortigi per novaj donacoj la kapitalan situacion. Ni fondis la Volontulan Servon de UEA por utiligi pli intense la helpon de volontuloj.

La rezulto de tiu agado estas jam konata al legintoj de la ĉi-jara Estrara Raporto. La financa pozicio de la Asocio abrupte kaj draste pliboniĝis. Fine de 1974 nia kapitalo sumis je 275 000 guldenoj. Ĝis la fino

de 1975 ĝi kreskis 26% al 347 000 gld. Kaj en la jaro 1976 ĝi kreskis ankoraŭ pli ol 37%, por atingi la rekordan nivelon de 478 000 gld. — tio estas kresko, interne de tri jaroj, de 75%.

Sed la kresko de la Asocia kapitalo estas nur la komenca stadio de la pligrandiĝo de la skalo de niaj operacioj. Ni nun havas certan rezervon, eĉ se limigitan. Nun necesas komenci ĝian investon en la laboron de la Asocio.

La financa situacio en 1977 ne aspektas tiel hela kiel en 1976, en la senco ke la rutina laboro de la Asocio estas ankoraŭ tro kosta kompare kun la rutinaj enspezoj. La solvo, gesinjoroj, estas skalo: ĝis tiu necesa vastiĝo okazos, la financaj atingoj de la pasintaj tri jaroj restos senproduktaj. Malantaŭ belaj spezokonto kaj bilanco por 1976 do restas fundamentaj kaj esencaj problemoj.

Hezitemo kaj manko de plena konvinko

Malgraŭ nia pli efika ekspluatado de volontulaj fortoj, unu el niaj plej grandaj problemoj restas la homa problemo. Ni ankoraŭ ne disponas pri sufiĉa rezervo de homoj pretaj plentempe dediĉi sin al la Volontula Servo aŭ (plej grave) okupi salajratajn postenojn en la Asocio. Oni rajtas demandi, kiel tio povus esti. Niaj salajroj ne estas inter la plej bonaj, niaj laborkondiĉoj ne estas inter la plej facilaj. Sed verŝajne tiuj ne estas la plej esencaj faktoroj. Temas miaopinio pri ia hezitemo, pri ia manko de plena konvinko pri la daŭra vivkapablo de la Esperanto-movado kaj (plej grave) ĝia daŭra kapablo kreski kaj plifortiĝi.

Necesas momente devojiĝi por ekzameni tiun aserton. Esperanto atingas ĉi-jare 90 jarojn de sia ekzisto. Kvankam plene esprimova, kvankam elprovita en ĉiuj mondaj medioj kaj sub plej malfacilaj kondiĉoj, malgraŭ tio, ke homoj vivis kaj mortis por la internacilingva ideo, malgraŭ tio, ke homoj ruinigis siajn karierojn, detruis la familian vivon, malriĉigis sin en la aspirado al ĝia venko, malgraŭ tio, ke homoj ridis kaj amuziĝis kaj riĉigis sian spiriton ĉe ĝiaj fontoj — tamen, ĝis nun ĝi ne ĝenerale enkondukiĝis, ĝi ne estas parolata en ĉiuj normalaj internaciaj kontaktoj. Ĉu indas la batalo? Ĉu ĝi meritas tian penon? Multaj homoj dubas. Ili perdas sian fidon. Kiam **iliaj** projektoj ne estas tuj aplikataj, kiam **iliaj** ideoj ne sukcesas, ili lasas la aferon. Anstataŭas ilin novaj adeptoj. Sed perdoj kaj gajnoj ekvilibras. La progreso, se entute estas progreso, malrapidas. Tiel la homoj ofte rigardas la aferon. Tial ili ne grandskale vojas al niaj pordoj por peti dungigon.

Sed ili eraras. Esperanto ne estas ia leĝera ideo modigebla per nura optimismo. Ĝi estas lingvo kaj kulturo kaj nova mondkoncepto; ĝi malrapide enradikiĝas; ĝi lante kreskas. Ja optimismo estas foje virto, sed en la Esperanto-movado ĝi kelkfoje kreas en niaj mensoj esperojn nerealecajn kaj postajn seniluziigojn. Ni bezonas momente ne optimismon sed realismon, ne belajn vortojn sed saĝan, sisteman kaj efikan ekspluatadon de monda situacio esence favora al nia afero.

Antaŭjuĝoj falas, la vojo malfermiĝas

Vi komprenu, gekolegoj, ke la bona volo montrita al ni de la islandaj instancoj, la simpatio nun transdonita al ni de Unesko — tiuj aferoj ne estas unikaj fenomenoj. Ili estas klaraj signoj, troveblaj ankaŭ en multaj aliaj medioj, ke la malnovaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto falas, ke la homoj fariĝas pli malfermaj al niaj ideoj, ke ni trovis finfine la formulon, kiu povas kapti kaj teni la intereson de niaj kuncivitanoj. Mallonge dirite, la tago de la ĝenerala utiligo de Esperanto hodiaŭ matene pliproksimiĝis. La vojo malfermiĝas al ni.

Kaj tion tamen rekonas certaj elementoj en la Esperanto-movado, kvankam ankoraŭ nesufiĉaj. La apogado de niaj membroj grandiĝas, la junularo venas al Esperanto en momente kreskantaj nombroj (sufiĉas nur ĵeti rigardon al la statistiko de la lastaj TEJO-Kongresoj por konstati tion), en la laboro de UEA estas senteblo nova realismo, nova sento de respondeco. Tra la Esperanto-movado ĝenerale estas videbla simila sobro aliro al la granda laboro por la enkonduko de Esperanto. Kreskas scienca interesiĝo pri la lingvo; eldonado en Esperanto denove intensiĝas; en novaj landoj la Esperanto-movado enradikiĝas; la informado pri Esperanto spertis plurajn imponajn sukcesojn en lastaj monatoj.

Idealoj kaj realo ne ekskluzivu unu la alian

Ĉio ĉi donas esperojn, ke la internaj administraj problemoj de UEA jam estas survoje al solvo; iom post iom la sopirata ekspansio okazos. Sed kiuj taskoj restas antaŭ ni por atingi tion? Unue, ni devas varbi saĝajn homojn, la plej bonajn homojn, spertajn homojn, energiajn homojn al la laboro. Due, ni devas plani — pensi pri la alternativoj, kiuj staras en la estonteco, koncentri niajn fortojn demokrate kaj interkonsente al la ĉefaj taskoj. Trie, ni devas eduki nin — pri la mondaj problemoj, pri lingvaj demandoj, pri organizaj metodoj, pri Esperanto mem. La ĉi-jara kongresa temo celas tion, cetere. Kvare, ni devas esprimi al la ekstera mondo bone elpensitajn, logikajn kaj aktualajn argumentojn, bazitajn sur saĝaj konstatoj pri la aktuala monda situacio. Kvine, ni devas tion fari konsekvence, daŭre kaj sen troa insistado unuflanke, kaj aliflanke troa retiriĝemo. Sese, ni devas evoluigi niajn proprajn lingvon kaj kulturon, por pretigi ilin por monda uzado.

Kaj en ĉio ĉi ni retenu senton de proporcioj. Ni estas monde grava movado, sed ne tiel monde grava kiel ni devus esti; ni serĉas la plej bonan vojon al sukceso, sed neniuj havas magian formulon aŭ monopolon de saĝo aŭ ĉionpenetran klarvidon; ni estas idealisma movado, sed idealoj kaj la realo ne ekskluzivu unu la alian; ni proponas al la mondo la Internacian Lingvon, sed ĝi ne estas kaj ne estu la sola solvilo por ĉiuj mondaj problemoj. Kaj se oni sobre frontas problemojn, sen troa optimismo, sen nerealecaj revoj, des pli ĝojiga estas la venko kontraŭ tiuj problemoj.

Malgraŭ ĉiuj miaj klopodoj, tiu ĉi nun tradicia raporto al la kongresanoj fare de la Prezidanto ankoraŭ estas



S-ro Vidar Gudmundsson salutis la Kongreson en la nomo de Islanda Esperanto-Asocio.

foje nomata de la kongresanoj festparolado. Al tiu nobla titolo, kreita de Zamenhof, tiuj ĉi raportoj ne aspiras, nek ili provu aspiri. Mia celo per la nuna parolado estis simple doni al vi enrigardon de nia laboro je la fino de la trijara deĵorado de la nuna Estraro. Mi kuraĝus diri, ke la Asocio, kiun vi konfidis al ni antaŭ tri jaroj estas hodiaŭ sana, unueca, laborkapabla kaj preta por novaj atingoj. Nome de la Estraro mi dankas pro via konfido kaj mi esperas, ke, same kiel ni, vi kredas, ke ni estas sur la ĝusta vojo.

Humphrey R. Tonkin

HONORAJ PATRONA KOMITATO KAJ MEMBRARO:

UEA honoras tri eminentulojn

RICEVINTE la koncernajn proponojn antaŭ la Kongreso — konforme al la tiurilata regularo —, la Komitato de UEA en Rejkjaviko unuanime (kun unu sindeteno) decidis nomi du eminentajn sciencistojn, profesorojn Fuĵio Egami kaj Vasil Peevski, membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA. En la sama komitat-kunsido s-ro Erik Carlén, multjara vicprezidanto de UEA, fariĝis Honora Membro de la Asocio.

FUĴIO EGAMI (Japanio) nask. en 1910; lernis Esperanton en 1928; 15 jarojn Komitatano de UEA; jam 10 jarojn prezidanto de Japana Esperanto-Instituto; monde konata biokemiisto: eltrovis la ribonukleazojn T1, T2, U2; gvidis la teamon, kiu epokfare kulturis senvivajn ĉelojn; prelegis kaj verkis en Esperanto pri sia fako; aldonis Esperantajn resumojn al pluraj studoj.

Modela lekciaro

LA REJKJAVIKA SESIO — 30a laŭvice — de Internacia Somera Universitato (ISU) ampleksis sufiĉe larĝan temaron, kvankam ĉi-jare — pli ol kutime — pluraj prelegoj traktis diversajn aspektojn de la kongresa ĉeftemo. La unua ero de ISU, iniciatita ĉi-foje pro multjara insista petado flanke de kongresanoj, la "tujkurso" trisesia pri la kongreslanda lingvo fare de la islanda vortaristo mag. Á. Bødvarsson, rektoro de la ĉi-jara ISU, allogis plenplenan salonon da ĉeestantoj: oni eĉ plenstopis la pordon. Se ne ĝuste tiom amasaj, tamen multaj homoj ĉeestis ankaŭ la aliajn naŭ pli tradiciajn prelegojn.

Mag. W. Auld (Britio), parolante pri "La rolo de originala literaturo en la historio de Esperanto", emfazis, ke Esperanto el ĉiuj ekzistantaj lingvoprojektoj estas la sola **arte** farita, kaj ke ĝuste el tio fontas ĝiaj sukcesaj lanĉigo kaj vivkreskado ĝis plenfunkcianta lingvo. Li memorigis, ke jam en 1901 M. S. Rakitski komprenis, ke la esperantistan bezonon de kulturo vere plenumas nur la originala literaturo de Esperanto, kaj ke tiu bezono estas pli esenca ol tiu de tradukoj.

D-ro D. Blanke (Germana DR), per "Konfronta komparo de planlingvo kaj etnolingvo" (Esperanto kaj la

germana), tuŝis la kongresan temon el la vidpunkto de scienca esploro. Kiam oni volas scii, ĉu kaj por kiaj celoj Esperanto pli glate uzeblas ol etnolingvoj, la demando antaŭsupozas scion pri la strukturaj ecoj, kiuj distingas Esperanton disde ili; nur ĉi tia konfronta komparado povas liveri tiun bezonatan scion.

Mag. Á. Bødvarsson (Islando) donis ekzemploriĉan prelegon pri la "Lingva akiro de infanoj", temo, pri kiu la psikolingvistiko multon malkovris lastatempe.

Mag. P. Daŝgupto (Hinda Unio) klarigis kontraŭ historia fono, ke la "Stato kaj influo de la angla lingvo en Hinda Unio" ludas tie pivotan rolon en la tuta lingva situacio, kiun li dismetis en tri tavolojn: sube, la 1000 (?) parolaj hejmlingvoj; meze, la 15 normaj skriblingvoj uzataj en la ŝtatoj; supre, la hegemoniemaj 2 — la hindia kaj la angla.

Prof. H. Frank (FR Germanio) detale kaj el kvanta vidpunkto pritraktis la temon de "Lernfacilecgradoj de diversaj fremdlingvoj" en prelego, kiu ripetis lian antaŭtagan prezenton en la Pedagogia Forumo de Eŭropa Klubo, aparta tuttaga aranĝo dum la kongresa semajno.

D-ro S. Kawamura (Japanio) trafe tuŝis la kongresan temon; lia pritrakto de la "Lingva problemo en kemia komunikado" ĉefe okupiĝis pri la eldonlingva konsisto de la profesia revuaro.


D-ro E. J. Lieberman (Usono) prelegis kaj gvidis kolokvon pri "La rajto, devo kaj hezito komuniki pri la sekso", kunplektante la kongrestemon kun tre aktuala problemo monda — la nasklimigo.

D-ro J. Pool (Usono) prelegis kaj gvidis kolokvon pri tio, "Ĉu komunikrajtoj povas esti egalaj?", surbaze de malkredo je neta komunikrajto, kiun havus unuopulo; li substrekis, ke komunikado ja dependas de aliula konsento aŭskulti.

D-ro C. Støp-Bowitz (Norvegio) prezentis tre interesan superrigardon pri la "Komunikiĝo inter bestoj", studobjekto de la naskiĝanta scienco zoosemiotiko, kiu de post la revolucia laboro de von Frisch — pri abelkomunikado — multe kreskis.

Pro sia ligiteco al la kongresa ĉeftemo, pro la fakto, ke pluraj prelegantoj unuafoje lekciis en ISU, pro aldono de pliaj facetoj al la aranĝo (kurso pri la kongreslanda lingvo, kolokvoj) kaj, kompreneble, pro la pluflego de la longa tradicio, la ĉi-jara lekciaro trudis sin preskaŭ kiel modelo por estontaj sesioj de la Internacia Somera Universitato.

P. D.



Tri honoritoj (de maldekstre): Egami, Peevski kaj Carlén

VASIL C. PEEVSKI (Bulgario) nask. en 1905; lernis Esperanton kiel gimnaziano; sekretariis en la Esperanto-societo en Pleven kaj gvidis kursojn; ĉefredaktoro de la Esperanta *Scienca mondo*; vicprezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista; dufoje rektoro de ISU; aŭtoro de sciencaj verkoj en Esperanto kaj plurfoja ISU-preleginto; eŭrope renoma geodeziisto.

ERIK CARLÉN (Svedio) nask. en 1906; lernis Esperanton en 1923; 10 jarojn vicprezidanto de UEA; multjara delegito kaj fakdelegito; unu el la iniciatintoj de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio kaj redaktintoj de *Internacia komerca kaj ekonomika vortaro*; iniciatis la Semajnon de Internacia Amikeco; verkis, prelegis kaj iniciatis radiodissendojn en kaj pri Esperanto; aŭtoro de lernolibroj.

Ĉu vi fotis en UK?

EN TIEL unike sukcesa Kongreso, kia estis la rejkjavika, la Foto-Servo estis kompleta paneo. La oficiala fotisto ja ĝenis ĉiujn gravajn kunvenojn, sed fine produktis nur kolorajn altprezajn neuzeblaĵojn. Se vi estis kaj fotis en Rejkjaviko, helpu al la Centra Oficejo iel kompletigi sian fotoarkivon pri la historie grava Kongreso. Antaŭdankon pro viaj (sukcesaj) fotoj!

Funda pritrakto de la ĉeftemo

DUA ĜENERALA KUNSIDO: La ĉeftemo de la 62a UK, "La rajto je komunikado", sukcesis en Rejkjaviko trudiĝi kiel ĉefokupo preskaŭ dum la tuta kongresa semajno. Traktita en du paroladoj dum la Inaŭguro, tri stud- kaj ses diskut-rondoj, podia diskuto kaj Dua Ĝenerala Kunsido, la temo efektive ĉefrolis kaj ne estas troigo aserti, ke neniam antaŭe kongresa temo tiel funde priesploriĝis. Veninte al la ĝenerala kunsido, kion faris plimulto de la kongresanoj, oni jam estis bone informita pri la traktotaj demandoj. Tial ĉi-jare ne okazis tiuj niaj kutimaj "maltrafoj de la temo", sed disvolviĝis interesa kaj fruktodona diskuto. Sub la gvido de d-roj Corsetti kaj Tonkin, en la debato partoprenis, interalie: A. Ísaksson (sekretario de la Islanda Unesko-Komisiono), L. Sussman (usona fakulo pri gazetara komunikado, speciale invitita por la debato), prof. Kameškov (Soveta Unio), d-roj J. Pool (Usono) kaj U. Lins (FR Germanio).

UNUA ĜENERALA KUNSIDO: Ĝi estis tre simila, almenaŭ ĝia unua parto, al la tradicia kongresa kunveno en kiu oni traktas la Estraran Raporton de UEA. Do pala, ripeta, okupiĝanta pri detaletoj. La dua parto de la kunveno, kiun prezidis prof. C. Støp-Bowitz, havis apartan titolon: "UEA sin preparas por la estonteco". Antaŭvidita kiel podia diskuto, tiu kunvenparto estis sufiĉe vigla kaj sukcesis ekstrakti plurajn demandojn (oficiala lerneja instruado, modernaj varbmaterioj, ekstereŭropa agado) al kiuj la Asocio estonte dediĉu apartan atenton. Necesus reveni al la sama temo kaj prepari ĝin tiel zorge kaj funde, kiel oni faris pri la kongresa ĉeftemo ĉi-jare.

PODIA DISKUTO: Tiu aparta aranĝo, en kiu bele miksiĝis kelkdeko da islandanoj kun sama nombro da kongresanoj, similis al ĉiuj aliaj, nur ne esperantistaj, internaciaj diskutoj: granda parto de la disponebla tempo konsumiĝis pro la neceso interpreti. Sub gvido de d-ro Tonkin, la kongresan temon traktis kvin diskutantoj. Inter ili estis du esperantistoj (d-ro D. Blanke el DR Germanio kaj mag. P. Dašgupto el Hinda Unio) kaj tri lekciantoj ĉe la Islanda Universitato: Silja Athalsteinsdóttir (lingvisto), Haraldur Ólafsson (antropologo) kaj Thorbjörn Broddason (sociologo). Interese estas, ke la plej forta pledo por Esperanto venis de islanda sindikata funkciulino, kiu sidis en la publiko.

LA RAJTO JE KOMUNIKADO

Konkludoj de la studrondoj pri la kongresa ĉeftemo en la 62a UK en Rejkjaviko

1. La rajto je komunikado estas en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo.
2. Por certigi, ke la ebleco estas je dispono de ĉiuj, individue kaj nacie, nepre necesas plene realigi la rajton je informado, proklamitan en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.
3. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implicas la eblecon informi kaj informiĝi.
4. Inter la obstakloj al la apliko de la rajto je komunikado estas la lingvaj baroj, kies rilatoj kun la aliaj aspektoj de la problemo estas studendaj kaj esplorendaj.
5. Unu demando, kiu meritas studadon, estas: ĉu neŭtrala internacia helplingvo povas fari kontribuon al la solvo de tiu problemo, je la nivelo de la individuo, de asocioj kaj ŝtatoj, kaj inter la nacioj.
6. Estas nepre necese konservi la integrecon de la kulturoj. La celo de internacia lingvo ne estas anstataŭi aliajn lingvojn, sed funkcii kiel dua, aŭ aldona, lingvo por ĉiuj. Tiel ĝi helpas konservi lingvan pluralismon.
7. En la moderna mondo la realiĝo de la rajto je komunikado devas inkluzivi la eblecon aliri bazajn komunikilojn. Ĝi ne estas realigebla sen la kapablo

legi kaj skribi en la gepatra lingvo. Por plena realiĝo persono devas havi la eblecon komuniki kun aliaj homoj, ne nur en sia ŝtato, sed tra la tuta mondo. La plej bona protekto de popoloj en landoj, kies lingvo estas parolata de nur malmulte da homoj, kontraŭ la superrego de pli grandaj lingvoj ŝajnas esti la plena posedo de sia gepatra lingvo kaj samtempe de internacia. Por tio la Internacia Lingvo Esperanto estus unike taŭga.

8. La evoluintaj landoj havas moralan devon helpi al la popoloj de la evoluantaj landoj pri la plibonigo de iliaj komunikiloj por komunikado interne de la koncernaj ŝtatoj kaj reciproke kun la ekstera mondo.

9. Meritas studadon la utileco de la Internacia Lingvo ĉe la evoluantaj landoj kiel komunikilo, kiu povus konservi la lingvan pluralismon. Tia studado devus ampleksi la facilecon de lernado de artefarita lingvo kaj ĝian neŭtralecon, inter aliaj faktoroj.

10. La popoloj, en siaj interŝtataj rilatoj, nepre devas povi kunlabori, en Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kun plena egaleco kaj digno, por la solvo de la gravaj problemoj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj, kiuj alfrontas la mondon.

11. Unesko kaj ankaŭ UN devas esplori novajn procedurojn, inkluzive la eblecon utiligi la Internacian Lingvon por dokumentado kaj interpretado, por ebligi la plenan realigon de la rajto je komunikado oficiala inter la ŝtatoj-membroj sen lingva diskriminacio.

(Kompilis Ralph Harry)

Ĉiuj laŭroj iras al "Inuk"

VALORIS IRI al Islando por vidi *Inuk*. Tiu unuhora teatra juvelo rikoltis senrezervajn laŭdojn kaj laŭrojn de ĉiuj spektintoj. La entuziasmo pruviĝis ankaŭ du tagojn poste — en la Solena Fermo —, kiam nura mencio de la spektaklo provokis aplaŭdegon.

Inuk (signifas en la eskima "homo") estas kolektiva verko de kvin geaktoroj de la Nacia Teatro de Islando kaj etnologo Haraldur Ólafsson. Oni diras "verko" kaj trafas nur la tekston. Verko estas la tuta prezentaĵo, la majstra kunplektiĝo de la teksto, danco, kanto, pantomimo, kostumo, sono, scenejo, lumo... La kvin geaktoroj, ni nomu ilin — Ketill Larsen, Kristbjörg Kjeld, Brynja Benediktsdóttir (reĝisoro), Helga Jónsdóttir kaj Thórallur Sigurdsson — estis en tiu horo unu korpo, kiu komence ritmas kaj idilie harmoniigas eĉ la hardecon de la avara igloa vivo, por en la fino horori kiel vundita mara monstro, kies tentakloj disŝiras la propran karnon.

La rakonto estas simpla: Eskima familio ĝuas sian penan panon de izolo en arktaj vendejoj; venas usonaj turistoj kaj alportas la civilizon de aviadila bruego, kokakolo kaj pafilo. Tio estas la fino de la rakonto kaj familio. Pivak amkantas komence de *Inuk*: "La ĉielvolbo plenigas min per feliĉo. La ventoj trablovas mian menson. Mi tremas de ĝojo antaŭ la maro, kvazaŭ brakumata de mia fianĉo." En la finalo lamentas Ikutak: "Mi timas pri la homoj, pri ni kiuj vivas. Al mi estas stran-

ge. La sibilanta vento dolorigas miajn orelojn. Mi ne eltenas la knaradon de la domo. Mi timas... Aja, aja... Mi aŭdas la homojn eksplodigi la rokojn. Estas kvazaŭ la Tero krevas, kvazaŭ ĝi atakas nin. La monto povus fermiĝi. Aja, aja..." Inter la du kantoj okazis la barbara invado de la civilizo. Inter ili okazis ankaŭ la sublime majstra geaktora tekso de la plej teatreca teatraĵo vidita en niaj kongresoj. *Inuk* fakte estas kanto; ĝi estas afiŝo pri danĝero, homrajta proklamo, potenca arta bombo, definitiva kiel ronda blanka riverŝtoneto. Ni preĝu revidi ĝin baldaŭ.

Tradukis Stefán Sigurdsson. Al la aktoroj peris Baldur Ragnarsson.

LA KVINJARA, plurlande sursceniĝinta Pola Esperanto-Teatro elektis por dufoja prezento en Rejkjaviko duaktaĵon de A. Cwojdzinski, *La hipnoto*. Lanta takto, ŝablona karakterumo kaj triangula intrigo pli malpli garantiis neimponon, malgraŭ la amezorge personec-enverŝa klopodo de la geaktoroj (Kalina Pieńkiewicz, Zbigniew Dobrzyński). Eble, se ili eĉ pli sordinus la patoson kaj estus forigintaj ĉ. tridek minutojn el la teda tekstomezo, la pilolo estus pli milda. Sed, ĉu tio valorus la penon? Kiel dirus praa literaturologo, la teksto donis neniun sukcon, kiun la rolantoj povus animizi. Cetere, temis pri la unua ludo de la nova repertuaro kaj malavantaĝo rivali al *Inuk*, ĉio ĉi en primitivaj teknikaj cirkonstancoj.

LA LUKSEMBURGA PUPTEATRO de Triksini (kaj lia asistantino V. Gass) prezentis la 31an de julio dufoje en tute plena salono *La butikistan korbon* de H. Sachs. Kvankam ne temis pri altnivela pupteatra arto, preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj — certe la pli junaj — pasigis tie agrablan duonhoron. La trafaj pupoj lerte instigis al respondoj kaj eĉ al kunkantado.



La virina triopo de "Inuk" (de mald.): Helga Jónsdóttir (Pivak), Kristbjörg Kjeld (Ikutak), Brynja Benediktsdóttir (Utak)

Rezultoj

ENIRIS la Konkursojn ĉi-jare 56 eroj — 32 poemoj, 16 prozaĵoj, 6 dramoj kaj 2 eseoj. La rezultoj estis jenaj:

POEZIO: 1. **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por *La blankaj perloj*; 2. egale al **Jiří Kořínek** (Ĉeĥoslovakio) por *Mezdecembra promeno* kaj al **Kazimierz Szczurek** (Pollando) por *La ĝardeno*; 3. **Masayuki Kuroda** (Japanio) por *Lazur' kristala kaj pluv' susura*.

PROZO: 1. **Bernard Golden** (Hungario) por *La lasta misio*; 2. **Bernard Golden** (Hungario) por *La profandado*; 3. **Aldo de Giorgi** (Italio) por *La rendevuo*.

TEATRAĴO: 1. Ne aljuĝita. 2. **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por *Post vizito*; 3. **Vesna Skaljer-Race** (Jugoslavio) por *Iketo*.

PREMIO LUIGI MINNAJA POR ESEO: Ne aljuĝita.

PREMIO HARABAĜIU por NOVA TALENTO: **R. de Jong-Beukers** (Nederlando) por tri poemoj kune: *La kato*, *La psikkanaligantoj* kaj *Ĉe ĉiu paŝo mia*.

FOTO: 1. Ne aljuĝita. 2. **Stefan MacGill** (Nederlando) por *Ekstaro*; 3. **Leila Kantonen** (Finnlando) por *Soleco*.

Pli detala raporto aperos en nia oktobra numero.

BELARTAJ KONKURSOJ 1977

Originala poezio

Unua premio:

La blankaj perloj

Ĉu vi vidis
vicon da blankaj perloj
surdorse de la bordaj rokoj
inter la maro kaj la pinarbaro?
Ĉu vi vidis la vicon de perloj
transformiĝi pro subita bruo
en blankan nubeton,
longe superŝvebi
la maran surfacon,
kaj poste
fali sur ĝin?
Jen —
dise kuŝas sur blua surfaco
la blankaj mevoj...

Vesna Skaljer-Race
(Jugoslavio)

Kelklinie pri...

KONVERSACIA RONDO: Ĉi tiu (relative nova) aranĝo pruviĝis utila. En ĝiaj kvar kunvenoj partoprenis pli ol 100 kongresanoj. Oni formis rondetojn, kantis, ludis, verkis kaj abunde ridis, ĉio ĉi en la salono "Schwartz".

PROGRESIGA KURSO: Ĝi okazis unuafoje en Rejkjaviko kaj montriĝis plena sukceso. La kompetenta kursgvidanto, mag. W. Auld, tamen ŝvitis kun grupego de 100 homoj.

CSEH-SEMINARIO: La pasintjara provo repopularigi la plej faman movadan instrumentodon ŝajnas sukcesi. En Rejkjaviko okazis kvar duhoraj lecionoj, plus unu demonstracio. Organizis A. Breddels, gvidis s-ino Haudebine, partoprenis 26 kursgvidantoj kaj 9 observantoj.

KVIZO "POR KE VI SCIU": Ĝi estis iom pala reludo de la atena premiero, eble pro la fakto, ke Auld ĉi-foje ne gvidis ĝin, sed nur troviĝis en la venkinta teamo (kun A. Fighiera-Sikorska kaj K. Kikuŝima). La embuska humuro de Beaucaire malpli vigligis ol la pasintjaraj petolaĵoj de Auld. La salono estis nekonvena.

AKCEPTOJ: Unu ĉe la urbestro, alia ĉe la Prezidanto de Islando, por po cent invititoj. Agrabla, festa etoso, precipe ĉe la Prezidanto, kiu pasigis 90 minutojn en konversacio kun plurdeko da gastoj.

BALO KAJ BANKEDO: Por la kutimaj kongresaj bankedantoj la rejkjavika festeno estis iom magra. Tio tamen ne ĝenis bonan etoson, kiu plivigliĝis kiam la kelneroj ekservis nemenditan vinon. La Balo estis

bela nur poste, kiam tiuj, kiuj ne havis sidlokon, laciĝis kaj foriris.

EKSKURSOJ: Preskaŭ ĉiu kongresano partoprenis almenaŭ unu ekskurson dum la libera kongressemajna tago. Centoj da kongresanoj ĵonglis por partopreni plurajn postkongresajn vojaĝojn tra la lando, kie ĉio estas vidinda nova sperto por la okulo.

MEMORAĴOJ: Islandanoj faris ion, kio ne estas praktikata en la lastatempaj kongresoj: ili produktis kelkajn belajn esperantlingvajn memoraĵojn pri la kongreslando (kvin koloraj bildkartoj, du specojn de belkoloraj ceramikaĵoj). Se montriĝos, ke restas nevenditaj stokoj, eble la Libroservo de UEA proponos ilin al vi.

FAKAJ KUNVENOJ: Plurdeko okazis dum la tuta semajno. Iuj kunvenis eĉ post la Solena Fermo. Pri tiuj kunvenoj verŝajne raportos la koncernaj fakaj periodaĵoj, kvankam ankaŭ ni revenos al iuj el ili en niaj postaj numeroj.

UMEA-PREMIO: Dum la jarkunveno de medicinistoj, kiuj venontjare festos la 70-jaran jubileon de sia asocio, d-ro H. Shinoda, honora prezidanto de UMEA, anoncis la ĉi-jaran gajninton de la UMEA-Premio. Temas pri d-ro J. Megyeri (Hungario) kaj lia esperantlingva medicina referaĵo.

EKSPOZICIOJ: Kunlabore kun la Nacia Unesko-Komisiono kaj UEA, Unesko aranĝis en Rejkjaviko fotoekspozicion "30 Jaroj de Unesko". La ekspozicion, kies bildklarigoj estas en Esperanto kaj la islanda, malfermis la Ĝenerala Direktoro de Unesko. Alia kongresa ekspozicio temis pri la pedagogia movado Freinet.

Sub la signo de elektoj

LA KOMITATO de UEA, kiu nun konsistas el 70 anoj (51A, 5B, 14C) kaj 5 observantoj, kunsidis sesfoje en Rejkjaviko, kie ĉeestis pli ol 70 procentoj de la komitatanoj. Ĉar temis pri elektojaro, granda parto de la kunsida tempo konsumiĝis tiucele, lasante malmultan tempon por aliaj debatoj kaj decidoj. Novaj komitatanoj C fariĝis: W. Auld (Britio), D. Blanke (DR Germanio), U. Grattapaglia (Brazilo), S. Kawamura (Japanio), U. Lins (FR Germanio), F. Luin (Svedio), G. Maertens (Belgio), C. Minnaja (Italio), C. Nourmont-Moon (Luksemburgo), P. Peeraerts (Belgio), J. Pool (Usono), R. Triolle (Francio), E.L.M. Wensing (Belgio) kaj E.J. Woessink (Nederlando). La konsisto de la nova Estraro aperas sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu numero. Tie vi povas informiĝi ankaŭ pri la nova disdivido de la estraraj taskoj. Estas aparte notinde, ke d-ro Tonkin, okaze de la reelektiĝo por la prezida funkcio ricevis 98 procentojn el la voĉoj, t.e. ĉiujn, krom unu sindeteno.

La Komitato diskutis kaj akceptis la Estraran Raporton 1976/77, spezokonton kaj bilancon 1976, spezokonton de la 61a UK en Ateno kaj buĝeton por la jaro 1978. Tiu decido pri la buĝeto inkluzivas ankaŭ la definitivan akcepton de la estrara propono, ke ĉiuj ekstereŭropaj abonantoj de nia revuo ekde la komenco de la jaro 1978 ricevadu ĝin aerpoŝte, sen aldona pago.



Ankaŭ la ideoj pri eventuala translokiĝo de la Centra Oficejo estis vigle pridiskutitaj. La Komitato atentigis, ke neniua decida paŝo tiurilate estu entreprenita sen anticipa komitata aprobo. Niajn legantojn devus aparte interesi la modifo de la Ĝenerala Regularo de UEA, kiu ne devigos estonte en la revuo aperigi informojn pri novaj delegitoj, kies nomoj kaj adresoj aperas regule en la Jarlibro. Estas akceptita ankaŭ baza regularo pri kongresaj giĉetoj kaj dokumentoj. La Komitato faris malgrandan modifon ankaŭ en la regularo pri la Honora Pa-

trona Komitato de UEA. Pri novaj membroj de tiu komitato bv. legi sur la p. 151 de ĉi tiu n-ro.

La nombro de estrarkunsidoj dum la 62a UK — entute sep — ne estas ilustrebla per la kvanto de komunikindaj decidoj. Kiel kutime dum la kongresoj, pritrakto kaj atenta sekvo de la kongresaj laboroj postulas plenan atenton de la Estraro, kiu fakte agas kiel ia nepublika LKK kaj faras multon de la laboro, kiu normale apartenus ankaŭ al la Kongresa Prezidentaro. Ĉi-foje aldoniĝis la fakto, ke temis efektive pri du estraroj — la malnova kaj la nova, elektita en Rejkjaviko. Tamen, pluraj eroj el la antaŭvidita ampleksa tagordo ricevis sufiĉe da atento kaj zorga priesploro (la Centra Oficejo, Volontula Servo, Universalaj Kongresoj en Varno kaj Lucerno, ktp.). Estas aparte menciindaj komunaj kunsidoj de la Estraro kun la ĉeestantaj estraranoj de ILEI kaj TEJO. Volante kiel eble plej bone utiligi la helpemon de la ĝisnunaj estraranoj Denoël, Wensing kaj Woessink, kiuj decidis ne plu kandidati por estraraneco, oni decidis nomi d-ro Denoël speciala konsilanto al la Estraro, dum s-roj Wensing kaj Woessink plue restos aktivaj en la Komisiono pri Administrado kaj Financo.

DU CED-KUNVENOJ EN REJKJAVIKO:

Ambiciaj planoj

EN REJKJAVIKO, la 2an de aŭgusto, okazis du kunvenoj de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kiu komence de 1977 havis la 25an datrevenon de sia fondiĝo.

El la du kunvenoj, ambaŭ en la salono "Wüster", la unua estis dediĉita al superrigardo pri la tuta agado de CED, dum la dua traktis la specifajn punktojn: *LPLP* kaj *Bibliografio*. Resuma raporto:

LPLP: Kiel informis d-ro Jonathan Pool en la januara numero de ĉi tiu revuo, *La monda lingvo-problemo* ŝanĝis sian titolon al *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado (LPLP)*. La unuaj du numeroj sub la nova — plurlingva — titolo estas jam kompostitaj kaj aperos post nelonge. La redaktoro restas prof. Richard Wood (nova adreso: Department of Foreign Languages, Plymouth State College of the University of New Hampshire, Plymouth NH 03264, Usono). Lin asistas redakta komitato, al kiu apartenas plej elstaraj fakuloj pri lingvo-planado kaj lingvo-politiko. Tiu komitato ne havas simple reprezentan karakteron, kiel antaŭe, sed ĝiaj membroj promesis unufoje jare prijuĝi manuskripton proponitan por publikigo en *LPLP*. Tio ĉi garantias altan sciencan nivelon de la revuo, apud kiu cetere ĝis nun ne ekzistas alia komparebla faka periodaĵo. Lastatempe, kiam *LMLP* rekaptis sian apero-ritmon, komencis rekreski la nombro de ĝiaj abonantoj. CED celas atingi 1000 abonantojn; supero de tiu nombro signifus eĉ profiton. Varba flugfolio estas preparata.

En Rejkjaviko oni diskutis ankaŭ pri la "enhavprofilo" de *LPLP*. Regis interkonsento, ke rilate la elekton de artikoloj necesos aparte konsideri la *internacian* aspekton de lingva komunikado.

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto: CED turnas sin per *LPLP* unuavice al la ekstera faka publiko. Samtempe ĝi celas plue eduki la parolantojn de Esperanto kaj speciale konscii ilin pri la valoro de scienca okupiĝo pri Esperanto. Al tiu celo servas la libro *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, nun kompostata, kiun verkis d-ro John Wells surbaze de siaj prelegoj en Ateno pasintjare. La aŭtoro utiligis por sia analizo la plej modernajn ekkonojn de la lingvistiko. CED intencas zorgi, ke lia elstara verko estu tradukita en naciajn lingvojn.

Bibliografio de vortaroj: Pri tiu projekto — bibliografio de planlingvaj vortaroj — ni raportis en la marta numero. Intertempe la laboro de la kompilantoj, s-roj Marinko Gjivoje kaj Edward Ockey, estas grandparte finita; restas esence nur kompletigi la liston de vortaroj en diversaj lingvoprojektoj (kiuj kompare kun Esperantaj vortaroj konsistigas nur 5%). Pri la aperigo CED nun traktas kun la proponinta eldonejo.

Esperantologio: Daŭras la esploroj kiel revivigi la revuon siatempe eldonitan de d-ro Paul Neergaard. Inter la ĝisnunaj konsideroj preferon ricevis la plano (re)starigi la revuon kiel internan, diskutigan periodaĵon, en kiu kontribuontoj al nacilingvaj fakaj revuoj submetu sian manuskripton al la kritika prijuĝo de samfakuloj-esperantologoj. CED petas pri (sin)proponoj por la ofico de redaktoro.

Aliaj eldonaĵoj: Sub aŭspicio de CED okazas la preparlaboroj por nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*. Plue aperos, kvankam neregule, *Novaĵletero por interlingvistoj*, kiu eventuale devos ampleksigi sian bibliografian servon. Planata estas baza broŝuro pri CED, kiu resumos ankaŭ la nunan staton de esploroj pri la monda lingvo-problemo kaj pri Esperanto; kiel antaŭpaŝo, de nun pli regule aperos la rubriko "Informoj de CED" en tiu ĉi revuo. CED preparas por Unesko studon pri la utiligo de Esperanto en scienc-teknika dokumentado kaj ankaŭ partoprenas en la pretigado de raporto pri la diskutoj en Rejkjaviko pri "la rajto je komunikado". Grandan interesigon trovis la propono esperantigi la sovetan verkon *Problemoj de interlingvistiko*.

Konferenco de CED: Jam komenciĝis la preparaj laboroj por Internacia Konferenco pri Esperantologio, okazonta en la kadro de la 63a UK en Varna kaj larĝe diskonigota ekster la Movado. Sinanoncojn de prelegantoj akceptas d-ro Detlev Blanke, Wolliner Str. 13/14, DDR-1058 Berlin, GDR.

Administrado de CED: La estraranoj de CED restas d-roj D. Blanke, U. Lins kaj J. Pool. Depende de restrukturado en la CO de UEA okazos parta transdono de administraj taskoj al Rotterdam. En Biblioteko Hodler estos kreita speciala sekcio por bazaj verkoj pri la monda lingvo-problemo.

U.L.

INTERNACIA ARTA VESPERO:

Elstara Damjanov

PER ARIO de Dunajevskij, la popolkanto "Ŝiptrenistoj de Volgo" kaj — kun Maria Angelova — fragmento el "Ĉardaŝ-reĝino" de Kalman, Veselin Damjanov estis regalo por ĉiuj, kiuj sukcesis kapti lokon en la plenplena salonego de la universitata koncertejo. Tio estis certe la plej bona Damjanov en pluraj sinsekvaj jaroj ekde kiam li partoprenas la kongresajn koncertojn. Bone, ke li ĉi-jare rezignis enprogramigi siajn proprajn komponaĵojn, kiuj — kvankam plaĉaj — restas subnivelaj por lia nobla, potenca kaj ellaborita voĉo. Angelova restas bona kaj ŝi tial malfacile povas



Veselin Damjanov kaj Maria Angelova en Rejkjaviko: Ili altigas la nivelon de la muzika vivo en la Movado.

surprizi. Male al Damjanov, kiu per sia repertuaro plane vigligas la publikon, la programo de Angelova konservas la nivelon (Campra, Grieg, Raĥmanjinov) kaj malzorgas la grandparte nekoncertan publikon. Tamen, "Knabino" de Dobri Ĥristov ĉi-jare estis pruvo, ke Angelova ankoraŭ povas surprizi. Cetere, la Kongreso en Varno estas ideala ŝanco por ke ni venontjare ĝuu memstaran koncerton de Angelova kaj Damjanov, kiujn en Rejkjaviko kompetente helpis ĉe la fortepiano David Hill. Li, cetere, portis al la programo la solan islandaĵon — "Burlesko" de Páll Isolfsson.

Alberta Casey (Usono) kaj Olivier Tzaut (Svislando), kun siaj kanzonoj kaj mikrofonoj, sonis tro pale post la bulgaraj kantistoj. Ili ambaŭ produktis lastatempe tre bonajn gramofondiskojn en Esperanto, kiujn nekonvene ilustris la troe improvizita sursceniĝo en Rejkjaviko.

Poetoj devus havi sian programon en la Kongresoj. Ilia duonhoru en Rejkjaviko ŝajnis daŭri multe pli longe kaj diserigis la jam nekoheran programon. Deklam-

aj mankoj de Marjorie Boulton vualis la kvaliton de ŝiaj tri freŝe verkitaj poemoj. Ho, kiel Jadwiga Gibczyńska deklamus tiujn versojn! Eble dank' al teknika paneo, William Auld (kiu unue gapis pro la foresto de muzika fono kaj poste feroce luktis por ne foni al la muziko) per fragmentoj el sia *Infana Raso* svingiĝis el voĉa letargio al vera deklama vervo. Tagor en la interpreto de sia brila tradukinto — Probal Daŝgupto — sonis klare kaj laŭte, sed ne deklame. Cetere, bardoj postulas minimume baritonon!

Belka Beleva monologis en rakonto de la bulgara klasikulo Elin Pelin. Ŝia arto tamen ne estas arena kaj ŝiaj voĉo kaj talento vane klopodis konkeri la vaston de la salonego. La pola geaktora paro Pieńkiewicz-Dobrzyński finis la Vesperon per sukcesa skeĉo "Familia vivo". La programon kompetente gvidis Eliza Kehlet.

La plej bona parto de la Vespero tamen estis la publiko, kiu ne montris siajn fajfokapablojn, malgraŭ pluraj okazoj reagi ĝuste tiel.

sm

ISLANDA VESPERO:

Bukedo manka

EKZISTAS BUKEDOJ, kiuj ne toleras ornamajn verd-aĵojn, ĉar la floroj sufiĉas. Islanda Vespero — en la antaŭlasta kongressemajna tago, por milhoma publiko — estis tia bukedo. Ĝia programo enhavis plurajn perlajn erojn, kiuj preskaŭ perdiĝis en la vorta "verdaĵo" de la tro ampleksaj prezentotekstoj. La gvidantoj de la programo ambiciis funde instrui anstataŭ nur vojomontre informi kaj lasi niajn neislandajn okulojn kaj orelojn ĝui kaj veni eble eĉ al eraraj konkludoj. Ekzemple: La jam longan programeron pri la orientece digna islanda sporto "glíma" akompanis tiel detalaj klarigoj, ke nun ĉiu spektinto de la Islanda Vespero povus kandidati por arbitracianto en tiu sporto.

La koruso Hljómeyki portis la tutan pezon de la alta arta nivelo de la Vespero. Certa pri sia valoro, ĝi dominis eĉ en la eroj, kie ĝi devus nur duarangi akompane, ekz. ĉe la dancoj. La majstreco de la naŭhoma koruso pruviĝis eble plej klare en la interpreto de la kantato *Songpoemo pri ponto*, kiun la komponisto Sigursveinn D. Kristinsson — li ĉeestis la Vesperon — dediĉis al UEA, memore al sia pasintjare forpasinta kolego-esperantisto H. J. Jakobsson. Tiu virtuozaĵo por miksitaj koruso kaj soprano, alda kaj baritona solvoĉoj, bazita sur juvela poemo, havas ĉiujn kvalitojn de nova himno de la Movado, krom ke ĝia melodio linio postulas plenan fortostreĉon eĉ de profesiaj kantistoj. Kia bedaŭro por tia moderna, senpatoŝa teksta trafo! ? Ni atendu aŭdi kiom pli potence sonos la vortoj "...ponto kreigos" (v. la tekston apude) en interpreto de ekz. 80-voĉa koruso el Targo-viŝte, eble jam en Varno! ? Estus krimo rapide forgesi

Ólafur J. Sigurdsson:

Songpoemo pri ponto

(Trad. Baldur Ragnarsson)

*El rul-ostetoj
por ludo simpla,
tigoj elastaj,
ten-radikoj,
plektoj muskaj sur
monto plukitaj,
sunaj radioj
kreigos ponto.*

*Ponto kreigos
per surambosa
sono martela,
susur' falĉila,
remaĉado de
greg' bruta,
vok' paŝtista
en mild-vespero.
El lan' delikata,
neĝoblanka,
eriofor'
mola, lumdona kaj*

*pur' lanuga
de cigno nobla,
junka arom'
kreigos ponto.*

*Ponto kreigos
per kantoj frataj,
murmuraĵa
lulo avina,
milda poem' de
morta patrino,
kanto de laca
patro senhava.
Ĉu malfirmas laŭ ŝajn'
ponto al knab' ?
Ĉu timas li alfidu
kie fortas plej la fluo ?
Tion vi ne timu.
Tenos ĝi vin.
Tenos ĝi vin,
kiam ŝtalo rompiĝos.*

la kantaton, kies vortoj kaj muziknotoj kaptas la pasintcon kaj spronas al la estonto ĝuste la Esperanto-movadon.

La prologa deklamo de Kristbjörg Kjeld, en eleganta nacia kostumo, alportis al ni la aktoran staturon kaj konvinkan voĉan noblon de scenejaj damoj de la tipo de Marlene Dietrich. La rimaj skandoj — kiun nomon ornamis tiu tondra voĉo? — kvazaŭ reeĥis inter la rokoj de la mirakla islanda pejzaĝo. Iel, tiu programero — ankaŭ iom tro longa — trudiĝis al mia orelo kiel pleje islandeca! Ĉe la jam aluditaj dancoj, la koregrafo tro insistas pri la originaleco kaj lasas la publikon vane atendi spektaklajn korpo-kirlojn, kiujn la paŝoriĉo klare ebligis.

sm

Orgenkoncerto

LA ORGENKONCERTO de David Hill (Britio), jam bone konata kiel pianisto, okazis la 3an de aŭgusto, kiu estis la ekskursita tago de la Kongreso. Ankaŭ la lastmomenta ŝanĝo de la preĝejo por la koncerto negative influis la nombron de la aŭskultantoj. La instrumento, de la nordeŭropa novklasika tipo, bone helpis al la orgenisto — tio tamen estas la ĉefa okupo de s-ro Hill — esprimi sian arton. La elekto de la komponaĵoj, la stilo de la interpreto kaj precipe la dinamismo de la tuta koncerto renkontis plaĉon ĉe la publiko. La kongresaj programoj ĝenerale devus estonte antaŭvidi plurajn malpli grandajn artajn aranĝojn, ĉar tio ebligis elekton kaj forigos la "devon" iri al la sola vespera aranĝo, antaŭvidita por ĉiuj kongresanoj.

M. Angelova

Sagaa festo

BALDUR, filo de Ragnar, mil kvardek sep jarojn poste, la 3an de aŭgusto, de sur la "Leĝroko", en la praislanda parlamentejo Thingvellir, deklamas: *Dum jaroj mil, de lafa rok', / kreskadis herboj dum somer', / disflustris ventoj en vesper', / kaj ŝaŭmis la river', / sen ajna kon' pri homa vok', / pri l' karakter' de l' epok', / pri ŝanĝo aŭ sufer'. ... Sed homoj ni kaj riskas do / esplori, krei — eĉ sen gvid', / batali, kredi — eĉ sen fid', / kaj morti sen valid'. / Se iu pensas tion tro, / li mokas l' ecojn de l' hero', / la ecojn sen solid'. / Kaj kiaj ni je nuna star' / sur lafa ŝtono de silent', / el okcident' kaj orient', / sub norda firmament'? / Soldatoj ni, de solidar' / kun egalec' sen lingva bar' / en mondo ĉe ferment'.*

Dum la ekskursita tago, en la majesta lafa amfiteatro, lagborde, kie en la jaro 930 kunvenis delegitoj el ĉiuj partoj de Islando kaj fondiĝis la unua islanda parlamento, tie okazis unu el la plej imponaj kongresaj solenaĵoj. Tie ankaŭ la prezidanto de UEA eldiris sian plej belan kongresan paroladon, kiu omaĝis la 90-jaran jubileon de Esperanto, plektante ĝin kun la gloro de la praa scenejo kaj ĝia spirito de toleremo:

"La spirito de Thingvellir venas al ni tra la jarcentoj — spirito de libereco, spirito de kunlaboro, spirito de egaleco, en kiu neniel malpliĝis la kuraĝa memestimo de

fiera popolo pro tio, ke ili submetiĝis al la juro kaj civilizo. Kiel tiuj delegitoj el ĉiuj anguloj de Islando, ni venis ĉi tien el ĉiuj anguloj de la mondo. Kaj ankaŭ nia tasko estas krei en spirito de reciproka estimo novan ordon — mondan ordon de lingva egaleco."

Reprezentante la ĉeestantan eliton de la Esperanta kulturo (Auld, Bernard, Conterno, Beaucaire, Régulo-Pérez kaj multaj aliaj), deklamis Marjorie Boulton. D-ro Bormann proklamis la aljuĝon de la Trofeo Fyne al la plej aktiva landa asocio — Esperanto-movado de Japanio.



La pratempa scenejo de Thingvellir akceptis plurajn centojn da esperantistoj por memorinda solenaĵo.

Ferma solenaĵo

FERMOJ ne estas solenaj; ili estas tristaj. Antaŭ la granda salono, en kiu la 6an de aŭgusto estis okazantaj publikaj dankesprimoj, transdono de la kongresa flago, raportoj pri la laboroj kaj konkursoj, prezento de la kongresa rezolucio ktp., promenis d-rino Lina Gabrielli, preskaŭ larmanta. Ni demandis, ĉu io malagrabla okazis, kaj ŝi konfesis, ke ŝi simple ne povas ĉeesti la solenaĵon, kiu signifas disiron, finon de tiu unika unusemajna movada respubliko. La kuraĝa eldonisto kaj poeto povas ŝajni escepte sentema, ĉar la aliaj kun la samaj sentoj ne aŭdacas fari ŝiastilan konfeson.

En la salono, kie sur la podio sidis la nova Estraro kaj kelkaj aliaj funkciuloj de UEA, d-ro Bormann koncize raportis pri la kongresaj laboroj; d-ro Tonkin prezentis la Kongresan Rezolucion kaj anoncis la rezultojn de la diversaj elektoj en la Komitato; s-ro Ragnarsson, ki-

el prezidanto de la Belartaj Konkursoj, informis pri la ĉi-jaraj rezultoj kaj, kiel prezidanto de la islanda LKK, transdonis la kongresan flagon al s-ro Aleksiev, kiu gvidos la organizajn laborojn en Varno venontjare.

Longa estis la listo de la institucioj, instancoj kaj unopuloj al kiuj la prezidanto de UEA esprimis dankojn pro ilia kontribuo al la sukcesigo de la Kongreso. Estas tempo rimarki, ke tiuj listoj longiĝas ĉiujare, kio estas bela kaj kuraĝiga fakto.

Post la fermo

La 12an de aŭgusto, kiam la lastaj postkongresaj ekskursantoj revenadis al Rejkjaviko, la islanda televido elsendis duonhoran debaton en la Internacia Lingvo, kun subtitoloj en la islanda, pri la kongresa ĉeftemo "La rajto je komunikado". Temis pri programo surbendigita dum la kongresa semajno. En la debato partoprenis: s-ino Ursula Grattapaglia (reprezentanto de la evolulandoj), ambasadoro Ralph Harry (kiel fakulo pri lingvaj problemoj en internaciaj registaraj organizaĵoj), d-ro Renato Corsetti (kunordiganto de la kongresaj debatoj pri la temo) kaj mag. Probal Daŝgupto (fakulo pri la lingvistikaj aspektoj de la temo). La programon gvidis — ankaŭ en la Internacia Lingvo — s-ro Óskar Ingmarsson, tradukisto de la islanda televido.

**ENTUZIASMAJ PRO LA PRESTIĜA EVO-
LUO DE LA RILATOJ INTER UNESKO KAJ
UEA, LA KONGRESANOJ TIUCELE DONA-
CIS 3000 GULDENOJN. PLIAJN DONACOJN
KUN DANKO AKCEPTOS LA C.O.**

300 en la 33a

La 33a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, inter la 9a kaj 16a de aŭgusto 1977, kunvenigis en la Universitato de Poitiers (Francio) pli ol 300 gejunulojn. Tre bone organizita en la urbo, kiu svarmis je afiŝoj pri la aranĝo, la Kongreso vekis konsiderindan interesigon en la francaj gazetaroj, radio kaj televido. La iom "tejo-ecce" petola raporto, kiu sekvas ĉi-sube, malatentis kelkajn gravajn aspektojn de la labora parto de la 33a IJK. Ekzemple: La Komitato de TEJO akceptis novan Statuton, kiun baldaŭ konsideros ankaŭ la Komitato de UEA. Tiu Statuto i.a. antaŭvidas dujaran mandaton por la Estraro de TEJO, anstataŭ unujaran, kiel ĝis nun. Tamen, al pluraj el la temoj, traktitaj en Poitiers, ni revenos en niaj estontaj n-roj sur la "TEJO-paĝo". Jen la raporto de nia speciala sendito:

KOMPARE kun aliaj lokaj granduloj — Alarik, Klodvigo, Karlo Martelo — tamen, la spirito de Rabelezo estis la plej hejma inter la kongresanaro de Poitiers. Nenion kontraŭ la laboremo de la partoprenantoj, sed la plej bone frekventita estis evidente la kela restoracio — salono "Rabelezo". Ĉiu el tiuj eminentuloj patronis iun el la kongresaj salonoj. Klodvigo aŭspiciis ekz. la solenan inaŭguron.

Plennombra aŭditorio aŭskultis la multdirektajn dancojn de la intertempe demisiinta TEJO-prezidantino. La cerbstreĉo komenciĝis per la prelegeto de d-ro Tonkin, kiu ne volis limiĝi je propraj salutoj kaj tiuj de la Honoraj Prezidantoj de TEJO. Lia analizeto de la esperantista sceno jam specifflanke enmiksiĝis en la sekvantan ĉefteman enkondukon: "Perspektivoj por junulara movado". La unua posttagmezo ne enhavis laborprogramon, sed tamen ne permesis mensan ripozon. La kvizo pri pasinteco kaj nuntempo de TEJO ne estis facila. Kiu ekzemple povas taksu, kiom da kravatoj kunportis al la Kongreso la TEJO-sekretario?!

Certe, sufiĉe multflanke traktis laborgrupoj kaj prelegoj la jam menciitan ĉeftemon. Aspektoj de porpaca agado prezentigis apud problemoj de junularaj teatro-trupoj, junularorganiza pozicio apud etnaj rajtoj. Kun iom da bona volo agordiĝas ankaŭ la rimedoj de akvopurigado. Finfine, ekologio koncernas la estontecon de la hodiaŭa junularo. Tiu grupo en vizito al purigejo eĉ havis la ŝancon diskoti (kun o anstataŭ u) la aferon surloke.

Vesperaj horoj ne estas tempo por labori. Se la TEJO-Komitato rompis tiun principon, tio dokumentas nur la tempomankon kaj laborkvanton de tiu organo. La vesperoj do estis kutime pli aŭ malpli kulturumitaj.

Teatraĵo *La justuloj*, verko de la franca filozofo Albert Camus, vere bone prezentita de la pariza teatra trupo TESP, reprezentis unu ekstremon, la Interkonatiga Vespero la alian, pro fiasko de ĉiuj klopodoj ĝin organizi. Ie en la tuta gamo oni devas loki la Literaturan Vesperon, la kermeson de la *Literatura foiro*. Enpakite en grandiozan ceremonion estis proklamata "la Verko de la Jaro 1976" (*Ĉu vi kuiras ĉine?* de Claude Piron). Ne tute maltrafa karikaturaĵo aperis vesperon poste en aljuĝo de glaso da kukumoj al la plej aĉa poemo de la jaro.

Tuttaga ekskurso estas unu el la ĉiam denove reaperantaj programeroj en la vico de la IJK-oj. Ĝi montras pejzaĝon, bierfarejon aŭ kondukas al strando. Ĉi-foje ĝi tamen gvidis la ekskursantojn tra la provinco, ĉirkaŭanta la kongresan urbon, kaj vidigis preĝejojn kaj kastelojn ĉe la vojo, spertigis ekzamenon pri la kapabloj de aŭtobusŝoforo en manovrado kaj orientiĝo sur mallarĝaj vojoj. La celo kaj apetita kulminpunkto estis la 600-jara abatejo de La Reau, pro vespermanĝo nek supa nek salata, sed subĉiela; temis pri ses ŝafoj, kiuj rostiĝis por nutri la IJK-anojn.

Kelkajn dubojn kaŭzis la iom eksternormaj kotizoj, sed la atendo ricevi ankaŭ ion specialan rilate organizon kaj servojn — ja realiĝis.

Guido Brandenburg

Nova Estraro de TEJO



Prezidanto: Savas Tsiturides (sur la foto), Greklando (kunordigado de la laboro; Statuto)

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Nov-Zelando/Nederlando (kunordigado de interna agado; eldonaĵoj; rilatoj kun UEA)

Vicprezidanto: Giulio Cappa, Italio (eksteraj rilatoj; studoj kaj esploroj; fakaj asocioj)

Ĝenerala sekretario: Brunetto Casini, Italio (eduko de gvidantoj; junular-delegitoj)

Estrarano: Thomas Bormann, FR Germanio (sekretario de la Komitato; individuaj membroj)

Estrarano: Floreal Gabalda, Francio (regiona agado kaj landaj sekcioj en Latin-Ameriko)

Estrarano: Miguel Gutierrez-Aduriz, Hispanio (regiona agado: kunordigado)

Estrarano: Csaba Lendvay, Hungario (landaj sekcioj)

Estrarano: Gert Van Tongerlo, Belgio (kongresoj, konferencoj kaj financoj)

Estrarano: Amri Wandel, Israelo (varbado)

Inaŭgura silento

La Solena Inaŭguro de la 62a UK tamen komenciĝis per embaraso. Laŭ la scenaro, KKS devis signali al la Kongresa Prezidentaro la momenton kiam la Alta Protektanto troviĝos ĉe la enirejo de la salonego. Tiu signalo ja okazis kaj d-ro Bormann petis stariĝi por la eniro de la ŝtatprezidanto. Iu ne konsciis, ke oni en solena silento jam staras en la salono. Tiu embarasa stara silento daŭris plenajn tri minutojn antaŭ ol transformiĝi en aplaŭdon al la eniranta Prezidento de Islando.

Danko reciproka

Dum la akcepto ĉe la Prezidento de Islando, d-ro Tonkin dankis al la Alta Protektanto pro ties veno kaj ĉeesto en la tuta Inaŭguro. Siavice la ŝtatprezidanto dankis al la kongresanoj, ke ili venis al la inaŭguro de lia renovigita rezidejo, ĉar la akcepto estis la unua oficiala aranĝo post la fino de sesmonataj renovigaj laboroj.

Sporto en la Komitato

Historio notos, ke la nuna prezidento de UEA en sia unua trijara mandato provizis la Movadon per pluraj proceduraj regularoj, tiel detalaj, ke ili antaŭvidas senpenan solvon de ĉia problemoj, kiu estiĝus en kunsidoj de la Komitato, Estraro, Kom-

isiono... Tamen, pro tiuj regularoj, la komitatanoj en Rejkjaviko preskaŭ ĉiuminute devis voĉdone levi la manon. En trihora kunsido tio ja fariĝas bela sporto, kiun cetere multaj komitatanoj forte bezonas.

Delegitoj kaj homoj

Resumante siajn kontaktojn kun esperantistoj dum la Kongreso en Rejkjaviko, la Ĝenerala Direktoro de Unesko diris, proksimume: 'En aliaj internaciaj kongresoj ni renkontas delegitojn; ĉi tie mi renkontis homojn'. Eble tiuj vortoj estas bona voĉmontrilo por tiuj, kiuj okupiĝas pri la ideo reformi la Kongresojn.

Librokaŝejo

La kongresa libroservo, kiun organizis Islanda Esperanto-Asocio, estis lokita en la plej fora teretaĝa angulo de la domo "Kalocsay". La libroj ne serĉis la aĉetantojn, sed la lastaj devis serĉi la varojn. Fine de la Kongreso evidentiĝis, ke la organizinto de la libroservo volas aĉeti la tutan restantan librostokon. Oni do kaŝis gardante por si mem.

Kie estas la Kongresa Libro?

Dum la kongresa semajno, la nova KKS, s-ro Charles Power, konatiĝis ĉiutage kun pluraj kongresanoj, eĉ se ili ne havis problemojn solveblajn per lia helpo. Estis li, kiu bezonis ilian helpon. Li kutimis subite alflasi iun kongresanon kaj demandi: "Ĉu mi povas konsulti vian Kongresan Libron?". Tiu lia ekzemplero senĉese ie perdiĝadis, inkluzive de

tiu, kiun li devus teni en sia kapo, ĉar li ja redaktis la eldonaĵon.

Kiel ili multiĝis?

Aŭdinte la klarigon, ke la unuaj loĝantoj de Islando estis irlandaj pastroj, surprizita komitatanino demandis: "Sed, kiamaniere ili tiom multiĝis?" Ŝi ne komprenis, ke nur de tiuj kelkaj pastroj — eĉ se katolikaj — originas la tuta nuna loĝantaro de Islando.

De tend' al tendo

Eble nur la japanoj, kiuj konatiĝis kun "Stafego" kaj "paro-dio", deĉifros nian titolon. Tamen, la rakonto jenas: Matene, en la postekskursa komitatokunsido, iu alarmis pro la malĉeesto de komitatanino, laste vidita dum ekskursado admiro de abismoj ĉe la grandaj gejseroj. Intensa detektivado nur konfirmis la danĝeran perdiĝon. Evidentiĝis poste, ke mankas ankaŭ komitatano. En la malfrua posttagmezo oni provis alarmi la policon, sed aŭdinte pri la para perdiĝo, la policianoj nur ridis. Prave, ĉar la perditoj reaperis en la vespero. Ilia serenecon ĝenis nur la fakto, ke oni malkovris la perdiĝon.

Ĉe-metoda piro

La partoprenintoj de la TEJO-kongreso en Poitiers ĝuis altkvalitan kabaredan programon de Claude Piron. La programero pri la fama Ĉe-metodo komenciĝis per: "Tio estas piro", kion la spektantoj obeeme ripetis korse. La posta ripetindaĵo tekstis: "Mi ŝatas Piron". Nur parto de la publiko rimarkis, ke Claude majuskligis la akuzativan "Piron".

Kokerika kunsido

Ĉar tagaj kunsidoj malhelpas komitatanojn partopreni aliajn kongresajn programerojn, la Komitato de TEJO, en Poitiers, traktis la novan Statuton de la junulara organizaĵo en kunsido inter la 00h45 kaj 04h45 nokte. Espereble, la Statuto ne respegulos tiun frumatenan kokerikan etoson.

Islanda veterregalo

Dum la kongresoj oni renkontas amikojn kaj emas fari kaj akcepti regalinvitojn. Pro la astronomie altaj prezoj, en Rejkjaviko tiaj invitoj tute ne okazis. La sola regalo — por ĉiuj — estis la escepte bela vetero dum la tuta Kongreso. La persiste blua ĉielo surprizis eĉ la islandanojn mem. Amaso da etaj organizaj malglataĵoj estis pardonita al LKK — nur pro la beleco de la kongressemajna vetero.



Dank' al Dio, ke ekzistas "Dia komedio"! Ankaŭ en Rejkjaviko unu el ĝiaj ekzempleroj iris donace al la islanda ŝtatestro. Kion oni faros estonte, ĉar almenaŭ la unua eldono de la ĉefverko de Dante ĵus elĉerpiĝis?

CENTRO
DE ESPLORO
KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA
LINGVO-PROBLEMO

esperanto en perspektivo

FAKTOJ
KAJ ANALIZOJ
PRI LA INTERNACIA
LINGVO


LONDON
ROTTERDAM
1974

esperanto
en
perspektivo

La unua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas jam de jardekoj elĉerpita, la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas nun prilaborata, sed oni atendas ĝian aperigon ankoraŭ plurajn jarojn. Feliĉe, ekzistas **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, kiu estas la movada

enciklopedio de la nuna tempo

Fakuloj epitetoj ĝin jene: monumenta enciklopedia verkego (Waringhien), epopeo (Pool), giganta trezoro (Blanke), senprecedenca entreprenado (Régulo), kvazaŭ streĉa romano (Wells).



Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Malnovaj Esperanto-revuoj interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.



Inĝenierino 35-jara deziras korespondi kun okcidenteŭropanoj: F-ino Maria Koleva Nenova, str. Bozujgrad 75, Stara Zagora, Bulgario.

Korespondantojn en Argentino, Aŭstrio, Italio kaj Nederlando serĉas 18-jara junulo: Mostafa Nadi, 64 Nasiri St., Tehran 18 Rej., Irano.

21-jara studento deziras korespondi tutmonde: Jacques Lindau, 3, rue Pershing, F-57100 Thionville, Francio.

Mi deziras interŝanĝi bildkartojn, alumetujajn kaj cigaredajn paketojn: Ana Ma Molera, Manresa 25, Moyá, (Barcelona), Hispanio.

Éva kaj Bernard Golden, hungara-usona esperantista geedza paro de Veszprém, Hungarujo, anoncas la naskiĝon de sia dua filo, David Alko, la 21-an de junio 1977.

GEESPERANTISTOJ! Vian scion de propra nacilingvo urĝe bezonas kreskanta mondorganizo: Transkontrolo de Tradukoj. 19, Moorland Road, Harrogate, Anglio.

30 gelernantoj, komencantoj ŝatas individue korespondi kun samaĝuloj el Eŭropa Komunumo, precipe el Britio; krome ankaŭ Hispanio, Kanado, Meksikio kaj Japanio. Hauptschule ELSSEN, Nesthauser Str. 1, D-4791 Paderborn-ELSEN.

Por ricevi senpagan specimen-ekzempleron de la *Internacia Kvitanc-libreto*, sendu 3 irpk-jn al Mondkomerca Eldonejo Esperantista (RE), Poŝtokesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam.

21-jara fraŭlo korespondus pri historio, muziko kaj sporto: Jerzy Jee-nel, ul. Tarnogórska 8, PL-42-693 Krupski Młyn, Pollando.

GRANDAN EKSPozICION aranĝas Korea Esperanto-Asocio (C.P.O. 4258, Seŭlo, Koreujo). Helpe sendu librojn, gazetojn, glumarkojn, leterojn, bildkartojn kaj ĉiajn esperantaĵojn. Sendu ĝis la fino de marto 1978. Anticipan dankon!

KOREKTO DE JARLIBRO 1977

Pro kompost- kaj kalkul-eraro malaperis Hispanujo el la laŭlanda resumo de la Delegitaro (p. 330-331). Oni bv. aldoni: Hispanujo 35D, 4VD, 3JD, 40FD, Sumo 82. Entute (56 landoj): 1169D, 181VD, 60JD, 1929FD, Sumo 3339. Ni petas pardonon.

daŭriĝas la serio internacia diskutejo: 3

koncepto de tuja **forigo kaj evito de inflacio**

necesas nur kompreni la racian funkciadon de la ekonomio kaj komprenigi vian potencularon

28p., 12 x 20cm. öS 54.— al poŝta ĝirkonto 7 503.218
Vieno, D-ro Josef Hartl.

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO

FESTOS SIAN 70-an DATREVENON

8-9a de okt. 1977 EN LA URBO KUOPIO (EN NORDORIENTA FINNLANDO) KAJ INVITAS KORE ĈIUJN LANDAJN ASOCIOJN SENDI SIAN REPRESENTANTON AL LA FESTO.

Se ne eblos sendi reprezentanton, ni ĝojus eĉ pro simplaj salutoj.

Kun antaŭdankoj,
Esperanto-Asocio de Finnlando,
p/a Lingvoponto, p.l. 119, SF-70101 Kuopio 10,
Finnlando.



Amuzate vi iros al la celo per



internacia lerneja esperanto-revuo
jarabono (3 n-roj) ĉe UEA: 5,70 gld.

AL VI DE MI



ALBERTA CASEY, el La Jolla, Kalifornio, ĵus produktis sian unuan gramofondiskon kun dek sep Esperantaj kantoj. Kvankam temas pri bone konataj, popularaj melodioj de diversnaciaj komponistoj kaj teksto-tradukintoj, la disko estas pli ol kutime rezulto de unuopa sindediĉo, ĉar: Alberta ne nur kantas, sed ŝi ankaŭ desegnis la kovrilon, ornamis ĝin per fotografiaĵo de la busto de d-ro Zamenhof, kiun ŝi mem skulptis, kaj — fine — la disko aperas kiel propra eldonaĵo de la artistino. La disko estas grandformata, stereofona. Pian-akompano de Edith Gordon. Prezo: Us. dol. 5,95 (15,00gld.). Post la 1-a de dec. 1977 la prezo altiĝos al: Us. dol. 7,00 (18,00gld.). Mendu ĉe: ELNA aŭ ĉe la Libroservo de UEA.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

^{nova} **adresŝanĝo**

de Jonathan POOL kaj Richard E. WOOD

La redaktoro de la fakrevuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (antaŭe *La monda lingvo-problemo*), prof. Richard E. Wood, ŝanĝis sian adreson la 1-an de aŭgusto 1977, al:

Department of Foreign Languages
Plymouth State College of the University of
New Hampshire
Plymouth, New Hampshire 03264, Usono.

La aganta direktoro de CED, prof. Jonathan Pool, ŝanĝos sian adreson je la 1-a de septembro 1977, al:

Department of Political Science, D0-30
University of Washington
Seattle, Washington 98195, Usono
(telefono: 206-543-7946).

La oficiala adreso de CED restos ĉe la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.